DIREKTORO :
Hector HODLER

ABONO
Jara abono 1,60 Sm (4 frankoj)
La abonoj komenciĝas de la 1a de ĉiu monato. Oni akceptas nur unujarajn abonojn. Oni abonas ĉe la Administrejo, Esperanto-Oficejoj kaj lokaj Agencoj.

Redaktejo & Administrejo :
8, rue Bovy-Lysberg. 8
GENÈVE (Svisujo)

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO
DE
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Duonmonata Internacia Gazeto

DIREKTORO :
Hector HODLER

REKLAMO

1 paĝo	160 Sm	(400 fr.)
1 kolono....	32 »	(80 fr.)
1/2 »	16 »	(40 fr.)
1/4 »	8 »	(20 fr.)
1/8 »	4 »	(10 fr.)
1/16 »	2 »	(5 fr.)

25 % por 12 anoncoj : 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj : Presejo U. E. A., *Chalon-s-Saône* (Francujo); G. WARNIER, 15, rue Montmartre, *Paris*; C.-A.-G. BROWNE, 51, Wych Str., *London*; W. C. KŒTZ, Rathausstr., *Leipzig*.

Dum la lasta Duonmonato

La 1an de Julio la nombro de la Esperantianoj atingis 4.000.

La tutmonde konata agentejo Cook estis enskribata kiel Esperantia entrepreno.

Interŝanĝo de Junuloj

En nia antaŭlasta No jam aperis intesa artikolo pri tiu demando. Ĝia aŭtoro larigis, en kio konsistas la tiel nomata nterŝanĝo de junuloj, kaj kiel ĝi estas ranĝita. La principo estas konata : du iverslandaj familioj, proksimume samangaj, deziras sendigi eksterlanden sian lon aŭ filinon, por ke ĉi tiu ellernu la nlandan lingvon kaj konatiĝu kun la oroj, kutimoj, labormetodoj de la lando izitata. Ili do sendos sian peton al iu omuna perilo, kiu ilin interrilatigos kaj, e iliaj petoj koincidas, penos, ke unu milio akceptu dum difinita tempo la fanon de la alia kaj reciproke. La gejuuloj tiel interŝanĝitaj partoprenas en hejma vivado, kaj tie ili lernas nave la lingvon, la vivmanierojn, kaj a labormetodojn de la lando, en kiu i enloĝiĝis. Tiu sistemo estas precipe ona per tio, ke ĝi de la gepatroj forrenas la maltrankvilecon, ĉu la infano stos bone akceptata. Alie ne povas okazi, r la gastiganta familio havas eksternde infanon, kiu estas samkondiĉe gasgata. Tio estas garantio, kiun ne povas eri alia sistemo. Por interrilatigi la failiojn, kiuj estas pretaj ĝin uzi, jam zistas perilo (Societo por interŝanĝo de junuloj), kaj multaj junuloj estis interŝanĝitaj kun la plej bonaj rezultatoj. el praktike montriĝas la ĝusteco de la incipo.

Tamen, estas nedubebla, ke la diversngveco estos baro al tio, ke tiu sistemo svastiĝos kiel multe kiel ĝi meritas. ektive, la diverseco de la lingvoj plej e malhelpas, ke familio de malsamaj gvolandoj povu facile interrilati pri la taloj de la interŝanĝo ; ĝi multe komkigas la laboron de la peranta societo j precipe ĝin limigas nur al la landoj, es lingvo estas la plej konata. Fakte, la terŝanĝoj ĝis nun plenumitaj koncernas eskaŭ ekskluzive la landojn de angla, nca kaj germana lingvoj. Aliparte la veturanta junulo, pro tio ke li nenion malmulte scias pri la lingvo de la reno vizitata, estas en malagrabla situacio j malfacile povas rilati kun siaj gastintoj, escepte se tiuj konas lian lingvon kio cetere el pedagogia vidpunkto estas albona, ĉar ĝi ĉe la junulo persistigas la nson pri la patra lingvo. Jen estas tiom materialaj kaj moralaj baroj, kiuj ne as venkataj de ĉiuj, kaj anstataŭ instiĉe la alveturanto amon kaj intereson lia nova hejmo lin forlogas de ĝi.

Alportu Esperanton kaj organizajon kiel E. A., jen malaperos tiuj malfacioj, kaj populariĝos tiu sistemo. Per niaj legitoj kaj konsuloj por Junuloj, la nilioj, kiuj deziras interŝanĝi sian inon, povas facile sin konigi ; la junula o de U. E. A. ricevos tiujn petojn kaj nos ilin koincidigi kaj plenumi laŭ sia o. Plej facile povos tiam komuniki la errilatigitaj familioj kaj notinde plisimpligita estos la laboro de la perilo. Plie ĝia agadkampo estos tutmonda, ĉar tutmonda ankaŭ estas ĝia organo, Esperanto. Nedubeble, la situacio de la alveturanta junulo estos pli bona. Li tuj povos ekrilati kun la gastiganta familio per Esperanto kaj, ĉar li tiun saman Esperanton uzis en la hejmolando, li ĉe la nova hejmo sentos sin ne kiel fremdulo, kiun ĉio apartigas, sed kiel membro de tiu granda rondo, kiu ignoras landajn kaj naciajn barojn, nome Esperantio.

Aliparte la lingvo Esperanto mem utilos kiel ŝlosilo kaj enpenetrigilo, tiel por ellernado de la nacia lingvo, kiel por plirapida kaj profunda konatiĝo kun la lokaj moroj, pensmanieroj kaj laboroj kaj se, kiel okazos pli kaj pli ofte, la alveturanta junulo alvenas en lokon, kie jam estas samaĝuloj sciantaj Esperanton, li per ĝi povos ekrilati kun ili, koni ilin, kaj konigi sian landon. Li estos en multe pli favoraj kondiĉoj por ŝati kaj ami la de li vizitatan regionon, en kies vivon lin nesenteble enkondukas Esperanto. El tiuj plifaciligoj oni povos atendi grandan plimultiĝon de la interŝanĝoj. La gepatroj jam ne timos sendi pliofte siajn gefilojn fremdlanden, unue ĉar - pro la sistemo mem - ili scias, ke ĉi tiuj estos akceptataj en plej bonaj kondiĉoj, due ĉar ili aliparte scias, ke per Esperanto la gejunuloj pli rapide alklimatiĝos dank'al la sento de solidareco, kui devas ligi Esperantianojn. En alia rilato ni per tio montros, ke anstataŭ esti malamiko al la nacioj lingvoj kaj ilia ellernado, Esperanto, kontraŭe, helpas al ili. Esperantismo nenion detruas kaj anstataŭas ; ĝi estas io nova, kio sin aldonas, kio malŝlosas, interilatigas, faciligas.

Ĉu por apliki Esperanton al interŝanĝo de junuloj, kiel al ceteraj entreprenoj rilataj al tiu fako, ni devas atendi ĝis estos milionoj da Esperantistoj ? Ĉiu, kiu konscias pri la agado de U. E. A , mem respondos. La Fako junuloj de U. E. A. ricevos ĉiujn proponojn pri interŝanĝo kaj penos rilatigi la proponantajn familiojn, zorgante, ke la interŝanĝo prezentu kiel eble plej multe da garantioj. Kiam ĝi mem ne povos koincidigi la petojn, ĝi konigos ilin per la ĵurnalo kaj klopodos tiel trovi interesatojn. Plenumante tiun laboron, U. E. A. samtempe ekfaros novan paŝon al sia celo, plifaciligi la rilatojn inter diverslingvanoj per Esperanto.

H. H.

SOCIA VIVO

KOMERCO & INDUSTRIO

Internaciaj Kursoj

La Societo internacia por la pliprosperigo de l'komerca instruado (Société internationale pour l'expansion de l'enseignement commercial) ĉiujare organizas internaciajn kursojn, tiun jaron en Le Havre, de la 26a de julio ĝis la 21a de aŭgusto Estos donataj samtempe du kursoj : unua por la franca lingvo, dua por socia ekonomio. Jam multe da profesoroj kaj studentoj ĉe komercaj lernejoj, komercistoj kaj oficistoj aliĝis. La kostoj por la kursoj ne estos tre gravaj, ĉar la partoprenantoj ĝuas 50 0/0 da rabato ĉe la francaj fervojoj, kaj la estraro zorgis pri tre malkaraj ĉambroj kaj pensionoj. Maksimume la eksterlandulo pagos, laŭ personaj postuloj : 160 ĝis 200 spesmilojn, entute. Sur la oficiala programo ankaŭ troviĝas du paroladoj de Sinjoro C Bourlet pri Esperanto.

Programoj estas senpage haveblaj, en franca aŭ germana lingvo, ĉe la prezidanto de la nomita Societo, Sro A. Junod en Berno, kie oni ankaŭ povas aliĝi.

J. SCHMID (Bern).

Internacia servo de postaj cekoj inter Svisujo kaj Anglujo

La svisa poŝta administracio, kiu jam de 1906 posedas la poŝtajn ĉekojn, plivastigis tiun servon al la eksterlandaj rilatoj. Ĝi faris antaŭ kelkaj monatoj kun « svisa Bankverein » en Londono, aranĝon laŭ kiu oni de nun povas fari monpagojn per ĉeko aŭ per ĝiro de Svisujo Anglujon kaj reciproke. La mondepono por la sendo de ĉeko okazas en Svisujo ĉe iu ajn poŝtoficejo, sed en Anglujo tiu mondepono estas farota ĉe la svisa Bankverein en Londono aŭ al unu el ĝiaj filioj en provinco. Same la monpago de ĉeko okazas en Svisujo per la poŝta personaro ĉe la loĝejo de la ricevonto, dum en Anglujo, la svisa Bankverein alsendas ĉekon al ricevonto kaj al tiu lasta restas la zorgo ĝin realigi, kio cetere prezentas nenian malhelpon en tiu lando kie la uzado de ĉekoj estas kutima.

Jen la taksoj fiksitaj por tiuj internaciaj ĉekoj : *En Svisujo* : 6 spesdekoj po 40 spesmiloj kun minimumo da 10 spesdekoj. *En Anglujo* : 1 1/8 0/00 de la sumo sendata, plue 2 spesdekoj por ĉiu ĉeko, kun min mumo da 12 spesdekoj.

Por la ĝiroj, tio estas por sumoj kiuj ne estas pagotaj sed simple transskribitaj de unu konto sur alian, la taksoj estas jenaj :

En Svisujo : 4 spesdeko po 40 spesmiloj kun minimumo da 8 spesdekoj. *En Anglujo* : 1 0/00 de la sumo transskribita, kun minimumo da 8 spesdekoj.

La monŝanĝo okazas en Svisujo kiel por la poŝtmandatoj, tio estas, la sterlinga funto valoranta 25,26 frankojn. En Anglujo oni kalkulas la monŝangon laŭ la taga kurso.

La takso estas dekalkulita de la sumo deponita de la sendanto. Se tiu lasta deziras pagi fiksitan sumon, li devas aldoni la takson al la sumo pagota. La monsendo ĉeke estas senteble pli malkara ol tiu poŝtmandate kaj ĝi prezentas la saman certecon. Estas antaŭvideble ke tuj kiam ĝi estos pli konata kaj pli ŝatata de la publiko, tiu pagmaniero rapide plivastiĝos.

F. H. (Neuchâtel).

Komerckontrakto inter Germanujo kaj la Respubliko El Salvadoro

Jen la teksto de tiu kontrakto, kiu estis subskribita la 14-an de Aprilo 1909 :

« Lia Moŝto Germana Imperiestro, reĝo de Prusujo, en la nomo de l'Imperio Germana kaj Lia Ekscelenca Moŝto, prezidanto de la Respubliko El Salvadoro, dezirante konservi la rilatojn de bona harmonio, feliĉe ekzistantajn inter la Germana Imperio kaj la Respubliko El Salvadoro kaj akceli la komercan trafikon inter ambaŭ landoj, decidis por tiu celo kontrakti kaj komisiis pri tio :

« Lia Moŝto Germana Imperiestro, reĝo de Prusujo ;

« Lian ambasadoran, eksterordinaran kaj rajtigitan ministron ĉe la Respubliko El Salvadoro, grafan moŝton Ulrich de Schwerin ; Lia ekscelenca moŝto prezidanto de l Respubliko El Salvadoro la ŝtatsekretarion de la eksterlandaj aferoj, Don Salvador Rodriguez Gonzalez kiuj interkonsentas pri jenaj artikoloj :

§ 1. — La kontraktantaj partioj sin ligas, doni unu al la alia la rajton de plej favorata nacio pri komercaj, ŝipiradaj kaj konsulaj aferoj. Pro tiu ĉi celo, ĉiuspeca rajto, libereco aŭ favoro, kiu unu el ili donos al tria nacio, per la fakto mem estos koncesiata al la alia partio kontraktanta.

§ 2. — Ĉiuspeca rajto, libereco aŭ favoro, kiun El Salvodaro donis aŭ estonte donos al ĉiuj aliaj Respublikoj de Centra Ameriko aŭ al iu ajn el ili, ne devos esti rigardata kiel donata al la Germana Imperio laŭ la interkonsento en artikolo 1a, se ĝi ne estos ankaŭ koncesiita al tria nacio.

§ 3. — Tiu ĉi kontrakto estos ratifikota kaj la ratifikoj dokumentoj kiel eble plej baldaŭ estos interŝanĝotaj. Ĝi ekzistu dek jarojn depost la tago en kiu oni interŝanĝos la ratifikajn dokumentojn. Se neniu el la partioj kontraktataj dekdu monatojn antaŭ finiĝo de tiu ĉi limtempo anoncos al la alia partio per speciala deklaracio la intencon, ĉesigi la efikecon de tiu ĉi kontrakto, ĝi daŭradu pluan jaron k t. p., ĝis la finiĝo de unu jaro post tia anonco.

« Por dokumenti ĉi tion, ambaŭ rajtigitoj enskribis tiun ĉi kontrakton kaj surstampis siajn sigelojn.

« Tiel farite en San Salvadoro en du originaloj, en germana kaj hispana lingvo, la dekvaran de aprilo mil naŭcent ok.

L. S. SCHWERIN.

L. S. SALVADOR RODRIGUEZ.

La supera kontrakto estas ratifikita. La interŝanĝo de l' ratifikaj dokumentoj okazis la 8an de aprilo 1909.

trad. M. K.

LA PROGRESOJ DE AVIADO

⁂ La « Angla Aviada Ligo » prezentos oran medalon por la plej bone funkcianta aerveturilon ekspozitan, ĉu pli pezan, ĉu pli malpezan ol la aero, ĉe la « Sporta & vojaĝa ekspozicio » ĉe « Olimpio », Londono, plej proksiman monaton. La 2a premio estas ora medalo kaj la 3a bronza. La premioj estos aljuĝataj pro ĝenerala funkciado, kaj ne necese por la modelo kiu flugos la plej malproksimen aŭ atingos la plej altan punkton.

PH. K. (Londono).

⁂ La Francuja Instituto donacis la trijaran premion Osiris da 40.000 Sm. al du famaj francaj aviadistoj L. Bleriot kaj Gustave Voisin. L. Bleriot jam de 1900 laboris pri aviadilo *kaj jam provis* plurajn aparatojn laŭ la modelo de unuplata aviadilo. La 31-an de oktobro 1908 li per sia aparato faris aeran rondvojaĝon de Toury ĝis Artenay, en Beauce kaj de tiam malgraŭ multaj akcidentoj plenumis novajn sukcesajn eksperimentojn. Gustave Voisin elpensis la duplatan aviadilon ; li fondis uzinon por la konstruado de tiuj aviadiloj, kiuj venkis multajn rekordojn, precipe dank'al la kondukantoj Delegrange kaj Farman.

Dank'al la favora sezono, la aviadaj eksperimentoj rekomencis en multaj lokoj. La flugoj de dek, dudek minutoj estas nun sufiĉe multenombraj. Rimarkindaj estas la eksperimentoj de aviadisto Latham, kiu per sia unuplata flugmaŝino *Antoinette IV*, faris flugon da 40 kil. en 39 minutoj ĝis 60 metroj de alteco. Oni atendas de li novajn rekordojn, kiuj sendube baldaŭ okazos.

G. S.

GEOGRAFIO

Tra Novzelando

Rotorua' en la norda Insulo de Novzelando, malproksime de la urbego Auckland' 171 mejlojn per vagonaro, estas la centro de la regiono de la « Varmegaj Lagoj ». Ĉi tie troviĝas multaj, mirindaj, kuracemaj fontoj kies akvo konigis la famon de la Rotorua'j banejoj tra la tuta mondo Rotorua' estas sanige lokita proksimume 1.000 futojn supre de la marnivelo. Ĝi posedas sekan, sanigan klimaton ; tie oni povas ĝui grandan nombron de brilegaj, sunplenaj tagoj, kaj la vesperoj kaj noktoj ĉiam estas belege varmetaj. La rapidvagonaro foriras el Auckland je la deka matene, alvenante Rotoruon je la sesa vespere. Ne estas loko en la konata mondo, kiu donas tiom da diversaj mirindaj logaĵoj kiom troviĝas en la terma regiono, kies centro estas Rotoruo. El la grandnombraj turistoj kiuj jare vizitas la « Varmegajn Lagojn », neniu povas sufiĉe priskribi la ĉarmecon kaj mirindecon, sed ĉiuj konsentas ke ĝi estas vere lando de mirindaĵoj, lando nekomparebla. Neeble estas priskribi en kia maniero la multaj bolantaj, bruantaj ŝumiagetoj ĉarmensorĉas la vidanton, nek la belegecon de la energiplenaj gejzeroj, ĵetantaj la bolantan akvon al la nuboj, ankaŭ la diversecon kaj kolorаj nuancoj de la varmegakvaj fontoj, kiuj troviĝas, en nekalkulebla nombro, tra la regiono. La belegaj fiŝplenaj lagoj, per kiuj Rotorua estas ĉirkaŭita kontrastas forte je la suprecititaj mirindaĵoj. En la urbo mem la belegaj artefaritaj ĝardenoj ĉiam ricevas la admiradon de la vizitantoj. Ĝi tie troviĝas la Registara Kuracejo, banejoj, tekiosko, kaj ĉia ludejo por teniso, golfludo, k. t. p. Ĉi tie troviĝas la « Rachel », belega, bolanta, multnuanca fonto el kiu la « Rachel », « Duchess » kaj aliaj banejoj ricevas sian akvon. Ĉi tie ankaŭ la « Malfroy » gejzeroj, kvankam malgrandaj, ĉiam ŝpruĉadas kaj interesegas la novalvenintojn. La vojoj en la ĉirkaŭaĵo estas bonegaj por aŭtomobilo aŭ biciklo kaj veturiloj iras ĉien, kien oni volas vojaĝi. En la « Maori » vilaĝo oni povos admiri la kukfaradon de la enlanduloj. Por la vilaĝano ne estas necese haki lignon aŭ porti akvon. Naturo mem zorgas pri la hejtigado kaj ĉiama provizo de bolanta akvo leviĝas el la projundaĵoj de la tero. Kiam oni volas manĝi, oni nur enmetas poton enhavantan terpomojn, fiŝojn aŭ bontrinkakvon en bolantan lageton. Vere estas simpla afero la kukfarado. Ĉiutage vidiĝas virinoj lavantaj la vestaĵojn en la varmegaj lagetoj antaŭ de la dompordo. Ĉie troviĝas vapornuboj sulfurplenaj ; la odoro ne treege plaĉas ĝis tiam, kiam oni kutimiĝis je ĝi. La « Maori'a vilaĝeto Whakarewarewa (elparolu Wakaruarua) du mejlojn de « Rotorua » estas la hejmo de la gejzeroj, kiuj ŝutas supren kolonon de akvo kaj vaporo al granda alteco, je neregulaj intertempoj. Malproksime oni povas vidi dum bela vetero la energian vulkanon « Ngaruhoe », kune kun « Ruapehu » kaj « Tongariro » ambaŭ senvivaj nuntempe Ĉi tie ankaŭ oni vidas la Maoriajn lignoskulptaĵojn, kaj povas viziti la loĝejojn de la enlanduloj. La Novzelanda Turisma Departemento estas tre energia kaj sindonema, zorgante pri la bezonoj kaj voloj de fremdaj vojaĝantoj.

G. FRASER (Taranaki).

La edukado de l'brutaro en Argentino

Nenia lando en la mondo posedas tiel vastan kaj riĉan kamparon por brutedukado kiel Argentina Respubliko, kie la milda kaj modera klimato ebligas, ke la brutaro vivas kaj grasiĝas sur plena kampo, sen bezono de stalo kaj artefarita nutraĵo. La provincoj de Buenos-Aires, Entre-Rios, la duono de Santa-Fe kaj la sudo de Cordoba povas nutri meznombre tri ĝis dekdu ŝafojn aŭ de duono ĝis du kornbestojn po hektaro, kaj la teritorioj de Pampa, Santa-Cruz, Rio-Negro, Neuquen kaj Chubut de unu ĝis tri ŝafoj po hektaro. La provincoj de Buenos-Aires, Santa-Fe, Entre-Rios, Cordoba, San Luis kaj la teritorioj de Pampa kaj Neuquen admirinde taŭgos por la edukado de la bovoj, ĉevaloj, ŝafoj kaj porkoj ; la provincoj de Rio-Negro, Chubut kaj Santa-Cruz speciale taŭgas por ŝafoj. En la malpli delikataj kampoj de Buenos Aires, Santa-Fe, Cordoba kaj San-Luis oni semas luzernon en granda kvanto. Praktike, tiu semo kostas nenion, ĉar ĝi samtempe okazas kun la semo de l'tritiko, lino aŭ maizo.

En 1908 la brutaro konsistis jene : 29.116.625 kornbestoj, 7.531.376 ĉevaloj, 750.125 azenoj kaj muloj, 67.211.754 ŝafoj, 1 403 591 porkoj, 3.945.086 kaprinoj. Laŭ la lasta recenzo tiu brutaro reprezentas kapitalon da 6.134.000,000 Sm.

La grandegaj nuntempaj brutoj venas el du importadoj dum la XVIa kaj XXIIa jarcentoj. Unu el ili venis el Hispanujo kaj atingis bordon de rivero la Plata, la alia komencis en Peruo kaj poste okupis la internon de Argentino. La kornbestoj importitaj el Peruo venis precipe de la sudo de Hispanujo. La kornbestoj kaj ĉevaloj estis el raso andaluza, la ŝafoj el la raso *churra*. La importado de la virbovoj, ŝafoj Merinos kaj pursangaj ĉevaloj komencis ĉe la unuaj jaroj de l'XIXa jarcento kaj pligrandiĝis ĝis 1870, epoko je kiu oni komencis importi brutaron de puraj kaj plibonigitaj rasoj. De tiam, la importitaj rasoj estis tiel diversaj, kaj la sovaĝa brutaro en landa mem estis tiel ŝanĝita de la kunmikso, ke ĝia pezo, ĝiaj proporcioj kaj ĝia produktado multe kreskis. La meznombro de la lanproduktado de la ordinaraj ŝafoj estas nur 2 1/2 kilogr. Dum en 1870 ĝi estis nur 3/4 kilogr ; la nunaj bovidoj liveras 250 kilogr. da viando anstataŭ 150 en 1870.

La *estancia* aŭ farmo estas formata per terajo de 10.000 hektaroj meznombre, sed kiu povas ampleksi de 2000 ĝis 300.000 hektaroj. Ĝi dividiĝas laŭ sep tipoj :

1e La farmoj ekskluzive destinitaj por la edukado de la kornbestoj, ŝafoj kaj ĉevaloj ;

2e La farmoj destinitaj por la edukado de la kornbestoj, ŝafoj kaj ĉevaloj, kaj por la grasigo de iliaj produktaĵoj ;

3e La farmoj destinitaj por la grasigo de la kornbestoj, kaj ŝafoj ;

4e La farmoj por brutedukado kombinita kun agrikulturo ;

5e La farmoj por brutedukado, brutgrasigado, kombine kun agrikulturo ;

6e La farmoj por brutedukado, brutgrasigado kaj laktekspluatado ;

7e La farmoj destinitaj por laktekspluatado.

Ĉiuj farmoj estas organizataj ĝenerale laŭ

Al niaj Abonintoj

NI INFORMAS ĈIUJN PERSONOJN KIES ABONO FINIĜIS KAJ KIUJ NE INFORMIS NIN PRI SIA INTENCO NE REABONI, KE NI ENKASIGOS LA ABONMONON PER LA POŜTO, ALDONANTE LA POŜTELSPEZOJN. NI KORE PETAS, KE ONI BONVOLU FAVORE AKCEPTI LA DIRITAJN POŜTREPAGOJN KAJ DAŬRIGI AL NI SIAN NECESEGAN APOGON.

ESPERANTO.

sama plano. La limoj estas farataj per ferfadenaj palisoj; la interno estas samrimede dividata laŭ enfermaĵoj de 100 ĝis 2500 hektaroj, kun unu aŭ pluraj fontoj, kun bruttrinkejo, se ne estas rivereto; el tiaj enfermaĵoj, difinita nombro estas dediĉita por la reproduktado, por la grasigado, por agrikulturo aŭ por la laktbrutaro. Centre staras, la formodomo ĉirkaŭita per legomĝardenoj kaj arbareto. Tiu farmdomo enhavas domon de bienulo, domon de l'ĉefzorganto kaj dometojn por laboristoj, krom diversaj tenejoj por la iloj, tondejo, banejo, stalo, kokejo, k. t. p. La brutaro vivas en paŝtejoj apartigitaj laŭ sekso kaj aĝo; ĝi estas zorgata de la laboristoj de la farmdomo; la ŝafoj estas apartigitaj po aroj da 1.200 ĝis 2.000, kaj gardataj de paŝtistoj, kiuj ricevas monatsalajron aŭ procenton el la produktaĵo, kaj kun sia familio vivas en dometoj ĉe la limoj de l'bieno. En preskaŭ ĉiuj *estancias* oni ekspluatas la kornbestojn, ŝafojn kaj ĉevalojn. En la *estancias* destinitaj por grasigado, oni konservas nur tian nombron da ŝafoj, kia povas nutri la servistaron kaj kelkajn ĉevalojn. Kiam oni plie ekspluatas lakton, oni apartigas 150 ĝis 250 bovinojn en laktejoj; ilin prizorgas laktistoj, kiuj ricevas procenton el la laktproduktaĵoj. Kiam la agrikulturo estas kombinata kun brutedukado, ĝi estas komisiata al farmistoj, kiuj ricevas, 50, 100 aŭ 200 hektarojn, en enfermaĵoj sendependaj, la necesajn ilojn kaj bestojn, kaj interŝanĝe pagas 50 0/0 el la neta produkto de la rikolto.

La industrio de l'brutaro en Argentino estas plej profitiga afero, precipe dank'al la malaltaj prezoj de l'tero, de l'farmo kaj de l'bruto kaj al la malmulta kosto de la edukado sur natura kampo. La proporcio de la riceveblaj profitoj grandaparte dependas de la uzata kapitalo, ĉar dank'al la eduksistemo, la elspezoj ne havas aritmetikan proporcian kun la kvanto de ekspluata brutaro; male, ili relative malkreskas laŭ tio, ke plinombriĝas la brutaro. Ekz : la edukado de 1 000 bovinoj proksimume same kostas kiel 500 kaj la edukado de 2.000 apenaŭ 15 ĝis 20 0/0 pli altaj ol por 1.000; do, se la personoj havas modestan kapitalon, ili ricevas profiton el asociĝo, ĉar tiel ekspluatelspezoj plimalgrandiĝas.

Por ekspluati oni povas ĉu aĉeti la terajon, ĉu ĝin lupreni, ĉu asociiĝi kun la bienulo. Kutime, la neriĉaj kapitalhavantoj povas asociiĝi kun la bienulo laŭ la jenaj kondiĉoj: la terhavanto liveras domon, enfermajojn, kampon necesan por brutaro kaj 800 ŝafoj; la paŝtisto aĉetas 800 pliajn kaj prizorgas la tutan brutaron. La produktaĵo estas egale dividata inter la bienulo kaj la paŝtisto. Tiaj kontraktoj estas kutime farataj por tri jaroj. La produkto de la lano, vendotaj ŝafoj kaj felo estas jarfine dividata; post tri jaroj, la plua kvanto de la naskitaj bestoj estas egalparte dividata.

La kapitalo necesa por ke la paŝtisto povu tiun sistemon estas proksimume jena; 800 ŝafoj po 2 Sm, 1.600 Sm; 6 ĉevaloj po 30 Sm, 180 Sm; mebloj, iloj, k t.p. 500 Sm: entute 2 280 Sm. Kun tiu kapitalo kaj bestoj liverantoj de 2 ĝis 3 kilogr. de lano, la paŝtisto ricevos profiton da 800 ĝis 1 200 Sm.

A. R.

Laŭ aldono de « le Figaro ».

Volgaj urboj : Kostroma kaj Kazano

De l'4a ĝis 14a julio oni havos en Kostroma regionan arĥeologian kongreseton preparatan de kelkaj najbaraj guberniôj. Pri ĝi mi rakontos pli detale en la sekvanta numero. Nun mi rapidas nur diri, ke la vizitontoj de Barcelono, ĉu amerikanaj ĉu japanaj ĉu de aliaj nacioj, havus ankoraŭ tempon plej bone kaj agrable konatiĝi kun nia Volga regiono. La tri monatoj antaŭ la Kongreso estas tie ĉi la plej bela sezono. La Volga efektive estas tute speciale majesta vivplena kaj alloga dum la somero. Ĉu oni venos al Kostroma per fervojo el Moskvo, ĉu per vaporŝipo el Kazano, oni ĉiam estos frapita unue de l'urba bordo, sur kiu oni, interalie vidos la antikvan Ipatan monaĥejon, kie loĝadis la fondinto de l'nuna rusa dinastio, la Katedralon, la pentrindan Tataran antaŭurbon. Atentu al la vaporŝipo ĉe unu albordiĝejo kaj rigardu du gimnazianojn promenantajn sur bulvardeto. Inter la gimnazianoj troviĝas jam kelkaj fervoraj esperantistoj. Same inter la lernantoj de la reala lernejo, kies unu instruisto estas sekretario de Kostroma Societo Esperantista kaj unu instruistino, donis la unuan publikan kurson en la legejo de Ostrovski. La meĥanika fako de l'teĥnika lernejo Ĉiĵov, same kiel la ĥemia, posedas esperantajn adeptojn. La seminarianoj legas jam librojn kaj jurnalojn de l'Esp. Societo. En Kostroma ekzistas *Komerca* lernejo sur la Volga kajo. Bedaŭrinde ĝis nun oni ne pensis interesigi ĝin pri Esperanto, sed la lastajn tagojn mi parolis kun ĝia direktoro, kaj li rilatas tute favore al la afero. La prezidanto de l'Konsumsocieto (vid. 5a) ĉe la fabriko Kaŝima montras grandan sindonemon al la disvastigado de Esperanto kaj ĝia praktika uzado.

La nombro de l'esperantistoj nun ĉiam kreskas en Kostroma kaj tiun ĉi someron la alilandaj vizitontoj trovas la plej koran akcepton ne nur de l'esperantistoj: ĉiuj rusoj estus tre kontentaj vidi gastojn el fremdaj landoj. Nuntempe sur la stratoj de Kostroma iradas dek du ĥinoj el Ŝanhao kun siaj silkaj komercaĵoj.

Plie unu ĥina strata vendisto iradas kun statuetoj kaj aliaj skulptaĵetoj el ŝtono. La Kostromanoj tre volonte aĉetas ĉe la ĥinoj.

En la bele lokita Nijnij kies faman foiron mi baldaŭ priskribos, kaj en Kazano oni ankaŭ trovos sufiĉe da esperantistoj. germanoj, francoj, angloj, italoj, kaj rusoj parolantaj diversajn lingvojn.

Nun mi pli detale diros pri Kazano (1). iama ĉefurbo de Tataraĥano, kie dum tri plej belaj monatoj de ĉi tiu regiono estas okazonta Internacia ekspozicio arangata de Kazana gubernia Zemstvo (landdelegitaro).

Tiuj kiuj vizitos unue la arĥologian kongreseton de Kostroma povos navigi al Kazano laŭ la Volga per vaporŝipo; aliflanke oni povos veni rekte al Kazano per fervojo kaj post ĝia vizito navigi iom laŭsupre la Volga. La nuna Kazano kuŝas je kelka distanco de Volga ĉe ĝia alfluanto Kazanka kaj ĉe la lagoj Supra kaj Malsupra Kabanaj, kunigataj de l'kanalo Bulako. Ĉe la lako Kabano troviĝas nun la botanika ĝardeno kaj Edukejo por la aligentanoj de la Kamo-Volga regiono: ĉeremisoj, mordvoj, ĉuvasoj, votjakoj kaj tataroj; oni preparas tie misiistojn, pastrojn kaj instruistojn por tiuj gentoj.

Moskva caro Johano la Terura per milito akiris Kazanon al la rusa regno en la jaro 1552a. La plej interesa vidindaĵo en la Kremlo estas la turo de Sumbeka, lasta tartara ĥanino. Kiam la rusa militistaro estis eksplodiginta la murojn de l'Tatara fortikaĵo kaj fine atakinta la turon, lastan rifuĝon de l'ĥanino, ŝi sin ĵetis de ĝia supro, por morti nekaptita. El la libro «Esperantaj prozaĵoj» oni povas legi « La reĝo kaj lia servisto », tradukitan de S-ro Kofman el la kolekto da Tataraj rakontoj prezentita de profesoro Katanov en la Arĥivoj de la Universitato de Kazan. Krom Universitatanoj, oni povas trovi esperantistojn ankaŭ ĉe « Popola Universitato » kaj « Rivera Lernejo. Ĝis nun mi ne scias ankoraŭ, ĉu oni trovus ilin ĉe la « Pastrara Akademio », la «Veterinara Instituto ». Elementa kaj mezgrada Teĥnikaj lernejoj, la reala lernejo, 3 knabaj 2 knabinaj gimnazioj, la Instituto por fraŭlinoj, la Normala lernejo, k. t. p.

Kazano posedas belan teatron kaj sur la placo antaŭ ĝi monumenton al rusa poeto Derĵavin, kuntempulo de Ekaterino la IIa. Sur la antaŭkremla placo troviĝas monumento al la imperiestro Aleksandro la IIa.

Volga, ĝiaj urboj kaj vilaĝoj estas ankoraŭ tre malmulte vizitataj de la fremdlandanoj, sed tiuj, kiuj kuraĝos veni, neniel bedaŭros tion. Ĉiulandanoj estos bonvenotaj. Nuntempe estas ja tre nature, ke la Japanoj veturu Barcelonon per Siberia fervojo. Tiuj el ili, kiuj povus komenci tuj la vojaĝon, havos la tempon pasi tra Kazano, Nijnij kaj Kostroma, halti iom en tiuj tri urboj kaj reale konatiĝi kun ili. Same la amerikanoj. Ĉu iuj el ĉi ne povus navigi senprokraste trans la oceano, pasi per fervojo tra Parizo, Dresdeno, Varsovio, Moskvo ĝis Kostroma, de tie navigi laŭ la Volga ĝis Nijnij kaj Kazano, de kie tra Kiev, Vieno, Genevo aŭ tra Odeso per maro ili povus atingi Barcelonon. Al la dezirantoj la Suldelegito tre volonte donos ĉiujn informojn necesajn por tia vojaĝo.

Anna Ŝarapov (Kostroma).

(1) La nomo mem « Kazano » estas tatara, ĝi signifas « Kaldrono » ĉar la antikva urbo troviĝis en valo, ĉirkaŭita de altaĵoj.

La Faktoj

31 Majo. Goeppingen — La direktebla aerŝipo Zeppelin, veturanta al Berlino ektuŝis arbon kaj difektiĝis.

1 Junio. Napolo. — Mortas muzikisto Jozefo Martucci.

Novjorko. — Franca kuristo Orphel gajnas premion da 20 000 Sm. en Maratona-Kurado.

2. Romo. — Pio deka per dekreto abolicias la advokatojn de Sia Petro.

3. Hago. — Oni malfermas internacian kolonian kongreson. La tagordo entenos la demandon pri internacia helpa lingvo.

5. Hago. — Solena bapto de princidino Julianino.

Milano. — Oni festas la 50-an datrevenon de la milito de 1859.

7. Vieno. — Alveturo de reĝo Ferdinando de Bulgarujo.

Marsilio. — Malfermo de la dua nacia kongreso de la laboristoj de la havenoj kaj doganoj.

8. Romo. — Foriras el Kapitolo la ciklistoj rapidsenditoj kiuj alportas al Milano kaj Parizo la senditaĵojn de la Roma urbestro.

12. Perizo. — Alveturo de la rapidsenditoj de la Roma urbestro.

13. Melegnano. Rememoro de la batalo de 1859 kaj inaŭguro de rememoriga ŝtono al franca kolonelo Poulz d'Ivoix.

Bolonjo. — Inaŭguro de granda arbara kongreso.

Spithead. — Okazas granda ŝipparado en kiu partoprenas 144 militŝipoj je la honoro de la membroj de la kongreso de la konferenco de la Brita gazetaro.


A. Tellini.

TRA LA MONDO

Vojaĝo tra la valo de Rejno

(*Daŭrigo*)

Eĉ, multaj lokoj en ŝtonegoj, elstaras el la akvo; ilin la fluaĵo ĝis nun ne povis tute forigi. La plej malfarĝa loko de la fluejo estas la tiel nomata « Binger Loch » (Truo de Bingen); tie la ŝipisto devas zorgeme serĉi ĝustan vojon inter la sennombraj rifoj. Se ne pensu ke vi vidos dum tiu ĉi parto de veturo nur nudajn ŝtonegojn! Ho ne! Inte ili sin etendas ĉarmaj vilaĝoj, kaj iliaj ĝaj enloĝantoj salutas vin el siaj beletaj dom kaj ĝardenoj. Multaj el tiuj ĉi vilaĝoj esta famekonataj tra la tuta mondo pro la bon vino kiun produktas iliaj regionoj; mi cita nur Boppard, St. Goar, Bacharach, Lorch, Ass mannshausen kaj Rüdesheim. Traveturint



RUINOJ DE HAMMERSTEIN (apud Lenterdorf)

la « Truon de Bingen » oni rimarkas sur la maldekstra bordo la urbon Bingen kun la enfluejo de la Nahe, sur la dekstra Rüdesheim kaj super ĝi, sur la monto, « Niederwald », la Germanan nacian monumenton. Nun la valo ree larĝiĝas. Ĉesas la ruinoj ĉesas la ŝtonegoj; anstataŭ ili oni vidas fruktodonantajn kamparojn. La Rejno tie ĉirkaŭfluas multajn insulojn. Pasinte Eltville kaj Biebrich, la ŝipo albordiĝas en *Mainz*. Mai estas tre malnova interesa urbo; ĝi hav belajn preĝejojn kaj aliajn konstruaĵojn (ek la kastelo de la princo-elektisto); de la bele promenejo sur la bordo de la Rejno oni vid la belan ponton super la rivero.

Ne pli longe, mi povas akompani vin, ja nur promesis al vi, gvidi vin de Kœln Mainz. Mi tre rekomendas al vi viziti la bel




OBERWESEL

urbon Frankfurt kaj ĝian Internacian Aerveturan Ekspozicion.

Ĉu la vojaĝo tra la Rejna valo plaĉis al vi? Mi kredas certe. Do venu mem kaj vidu, ĉu ne ĉio estas multe pli bela ol mi provis priskribi ĝin! U. E. A. volas plifaciligi al vi tiun vojaĝon; ĉar la Turisma Fako intencas aranĝi Rejnan karavanon. Se vi volas partopreni, skribu al S-ro Komitatano! Sed ankaŭ s vi estos bonvenanta ĉe la gastamaj Rejnla danoj.

H. Arntz,
Del. de U. E. A., prez. de E grupo Bad Godesberg.
(Rejno Esperanto-Kolonio



BRANBACH
Kun, antaŭe, Warksburg

FELIETONO DE « ESPERANTO » 8

RAKONTO PRI SEP PENDIGITOJ

De Leonid Andrejev

Dediĉita al Lev. Nikolajeviĉ Tolstoj

VI. La horoj kuras

(*Daŭrigo*)

La fortikaĵo, kie estis enŝlositaj la kondamnitaj teruristoj, havis sonorilegon kun antikva horloĝo. Ĉiun horon, duonhoron kaj kvaronhoron, la horloĝo sonoradis ion daŭran, malĝojan, kiel malrapide foriĝadis en altaĵon, kiel malproksima kaj plenda bleko de formigantaj birdoj. Dum la tago tiu ĉi stranga kaj malĝaja muziko perdiĝis en la bruo de l'granda homplena urba strato apud la fortikaĵo. Bruegis la tramoj, frapadis la ĉevalhufoj, de malproksime antaŭen signalis la balanciĝantaj aŭtomobiloj; por la karnavalo venis el la ĉirkaŭaĵoj specialaj karnavalaj veturigistoj-kamparanoj, kaj la tintiloj sur la koloj de iliaj malgrandkreskaj ĉevaloj plenigis la aeron per zumado. ankaŭ la karnavalaj interparoloj iom ebriaj, gajaj; kaj al tiu ĉi dissonado tiel konvenis la juna printempa degelo, la marĉaĵoj sur la trotuaro, la subite nigriĝintaj arboj en la skvaro. De la maro varma vento blovis per larĝaj malsekaj atakoj: ŝajnis, kvazaŭ oni povis per okuloj vidi, kiel etaj freŝaj partetoj de l'aero flugas rigarde kaj en opa amika flugado forportiĝas en senliman liberan malproksimajon.

Dum la nokto en la lumo de solaj elektraj sunoj la strato silentiĝadis. Tiam la grandega fortikaĵo, sur kies glataj muroj estis nenia fajreto, forŝoviĝis en senbruan mallumon kaj apartigis sin de ĉiam viva moviĝanta urbo per senmova, malluma limo de silento. Kaj tiam la sonorado de horloĝo fariĝis aŭdebla; malrapide kaj malĝoje naskiĝadis la stranga, fremda por la tero, melodio kaj estingiĝis en altaĵo; ree naskiĝadis, trompante la orelon, sonadis plende kaj mallaŭte — interrompiĝis — ree sonadis. La horoj kaj minutoj kvazaŭ grandaj, travideblaj vitraj gutoj faladis el nekonata alteco en metalan, mallaŭte sonorantan tason; aŭ flugadis formigantaj birdoj.

Tage kaj nokte nur tiu ĉi sola sonoro atingis la ĉelojn, kie la kondamnitaj troviĝis ĉiu aparte. Ĝi penetris tra la tegmento, tra l'dikeco de ŝtonaj muroj, ŝancelante la silenton foriĝis senrimarke per same senrimarke reveni. Iafoje oni forgesis kaj ne aŭdis ĝin; iafoje oni atendis ĝin malespere, vivante de unu sonorado ĝis la venonta, ne konfidante jam al la silento. Tiu ĉi malliberejo estis difinita nur por gravaj krimuloj; ĝia regularo estis aparte severa, neŝanĝebla kaj kruela, kiel angulo de fortikaĵa muro; kaj se estas ebla io nobla en krueleco, do estis nobla la senbrua, morta, solene muta silento, aŭdiganta bruetojn kaj eĉ spiron.

Kaj en tiu ĉi solena senbruo, ŝancelata de malĝoja sonorado de forkurantaj minutoj, kvin homoj — du virinoj kaj tri viroj — apartigitaj de ĉio ajn viva, atendis la alvenon de nokto, tagiĝo kaj ekzekuto, kaj ĉiu el ili siamaniere sin preparis al ĝi.

VII. Morto ne ekzistas

Kiel dum la tuta vivo Tanja Kovalĉuk zorgis nur pri la aliaj kaj neniam pri si mem, tiel ankaŭ nun ŝi suferis nur pri aliaj kaj multe sopiris. Ŝi prezentis al si la morton nur tia, kia ĝi estis turmentanta por Serejo Golovin, por Musja, por aliaj, kvazaŭ ŝin tute ne koncernis ŝin mem.

Kaj, rekompencante sin pro la deviga firmeco dum la juĝo, ŝi ploris tutajn horojn, kiel kapablas ploradi maljunaj virinoj, kiuj konis multe da malĝojo, aŭ junaj, sed tre kompatemaj, bonkoraj homoj. Kaj la supozo, ke ĉe Serĉjo povas eble ne okazi tabako, aŭ eble ĉe Verner mankas la dense infuzita teo, kiun li kutimis, — kaj tio ĉi estas ankoraŭ aldone al la deviga morto — suferigis ŝin, eble, ne malpli, ol la pensoj pri la ekzekuto mem. La ekzekuto estas ja neevitebla, eĉ io flanka, pri kiu pensi estas sentaŭle, sed, se al iu en malliberejo, kaj tiel antaŭ la ekzekuto, mankas la tabako, tio estas tute neelportebla. Ŝi rememoris laŭvice la agrablajn detalaĵojn dum la kuna vivado kaj sentis mortan timon, pensante al si la rendevuon de Sergej kun liaj gepatroj.

Kaj rilate al Musja ŝi sentis apartan kompatemon. Jam delonge ŝajnis al ŝi, ke Musja amas Verneron, kaj kvankam tio estis tute nevera, tamen ŝi revis pri la bonaĵo kaj io luma por ili ambaŭ. Dum la libereco Musja havis arĝentan ringon, sur kiu estis ĉizitaj kranio kaj osto, ĉirkaŭitaj per prunelkrono; kaj ofte Tanja Kovalĉuk kun malĝojo rigardis tiun ringon, kiel simbolo de sindediĉo, kaj jen ŝerce, jen serioze, ŝi petis al Musja forpreni ĝin.

— Donacu ĝin al mi, — petadis ŝi.

— Ne, Tanjo, mi ne donacos. Vi do baldaŭ havos sur la fingro alian ringon.

Aliflanke oni kredis ial, ke ŝi nepre eĉ tre baldaŭ estas edziniĝonta, kaj tio ŝin ofendis, — ŝi deziris nenian edzon. Ŝi rememoris tiujn ĉi duonŝercajn interparolojn kun Musja kaj tion, ke nun Musja efektive estas kondamnita, kaj larmoj de patrineca kompato sufokis ŝin. Kaj ĉiufoje, kiam sonoradis la horloĝo, ŝi levadis la vizaĝon, kovritan per larmoj kaj aŭskultadis — kiel oni akceptas tie en aliaj ĉeloj tiun ĉi daŭran persistan vokon de la morto.

Musja do estis feliĉa.

Metinte la manojn posten sur la dorso, en granda, ne laŭkreska, malliberula mantelo, kiu strange similigis ŝin al viro, junuleta knabo, vestinta fremdan vestaron, ŝi paŝadis egalmezure kaj senlace. La manikoj de mantelo estis tro longaj kaj ŝi refaldigis ilin, kaj maldikaj, preskaŭ infanaj malgrasiĝintaj brakoj elstaris el larĝaj malfermoj, kiel flora trunketo el kruda malpura kruĉo. La kruda tuko piketis kaj frotis la blankan delikatan kolon kaj iafoje Musja per movoj de ambaŭ manoj liberigis la gorĝon kaj singarde palpis per la fingro tiun lokon, kie la incitita haŭto ruĝiĝis kaj doloretis.

Musja paŝadis — kaj emociiĝante kaj ruĝiĝante pravigadis sin antaŭ la homoj. Ŝi pravigadis sin je tio, ke ŝin junegan, sensignifan, kiu faris tiom malmulte kaj tute ne heroinon, oni submetos al tiu sama bela kaj honora morto, per kiu ĝis tiam mortis veraj herooj kaj martiroj. Kun senhezita kredo je homa boneco, kunsento kaj amo, ŝi prezentis al ŝi, kiel la homoj emociiĝas nun pri ŝi, kiel ili suferas kaj kompatas, — kaj ruĝiĝante ŝi sentis skrupulon, kvazaŭ ŝi faris ian grandegan maldelikatecon, mortante sur la pendigilo.

Dum la lasta rendevuo ŝi jam petis la advokaton, ke li provizigu ŝin per veneno, sed subite ŝi ekmeditis: kaj se li aŭ aliaj pensos, ke tio ĉi estas koketeco aŭ malkuraĝo, kaj anstataŭ morti modeste kaj senrimarke, ŝi faros eĉ pli grandan bruon? Kaj ŝi rapideme aldonis:

— Cetere ne, ne estas bezone.

Kaj nun ŝi havis nur unu deziron: klarigi al la homoj kaj precize pruvi al ili, ke ŝi ne estas heroino, ke morti tute ne estas timige, ke oni ne kompatu ŝin kaj ne zorgu pri ŝi; ankaŭ klarigi al ili, ke ŝi tute ne estas kulpa je tio, ke oni submetas ŝin junegan, sensignifan al tia morto kaj oni faras tiom da bruo pri ŝi.

Kiel homo, kiun oni efektive akuzas, Musja serĉis pravigojn, penante trovi almenaŭ ion, kio plialtigus ŝian oferon, donus al ĝi ĝustan valoron. Ŝi meditadis:

— Certe, mi estas junega kaj mi povus koraŭ longe vivi. Sed?...

Kaj kiel kandelo malheliĝas en la brilo leviĝinta suno, tiel ŝajnis al ŝi malbrila k kaj radiluma, kio estas lumigonta ŝian m destan kapon. Do nenia pravigo.

Sed eble tio aparta, kion ŝi portas en animo — la senlima amo, la senlima preteco heroaĵo, la senlima malzorgo pri si me Efektive, ŝi ja ne estas kulpa, ke oni malhe pis al ŝi fari ĉion, kion ŝi povis kaj intenc — oni mortigis ŝin sur la sojlo de l'temp ĉe la subo de l'altaro.

Sed se ĝi estas tiel, se la homo valoras nur pro tio, kion li faris, sed ankaŭ pro ti kion li volis fari — tiam... tiam ŝi meritas martiran kronon.

— Ĉu vere? pensas Musja honteme. Ĉu ve mi meritas? Mi estas inda, ke la homoj plo pri mi? Ke ili emociiĝu pro mi, tiel ma granda kaj sensignifa?

Kaj nesprimebla ĝojo plenigas ŝin. Esta jam nek duboj, nek hezitoj; ŝi estas akce tita en la senon, ŝi rajte eniras en la vico de tiuj heluloj, kiuj dum centjaroj tra brulŝtiparo, turmentoj kaj ekzekutoj irad al alta ĉielo. Hela paco kaj kvieto, senlim mallaŭte brilanta feliĉo. Kvazaŭ ŝi jam forl sis la teron kaj proksimiĝis al la sunbrilo de l'vero kaj vivo, kaj senkorpa ŝi flirtad en ĝia lumo.

— Kaj tio ĉi estas morto? Do kia mor Estas tio ĉi? — pensas Musja feliĉege.

Trad. D-ro J. Ostrovski.

(*Daŭrigota*).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

U. E. A.

OFICIALA INFORMILO

Fako Ia : ADMINISTRADO

Oficiala Bulteno No 2.

Niaj kunlaborantoj kaj membroj trovos ĉe informiloj de Fakoj Komerco, Junuloj, Tusmo raporteton pri la ricevitaj respondoj Oficiala Bulteno No 2a. Ni plezure konstas, ke la plej multaj el niaj Del. & Subdel. rovis la klopodojn preskribitajn en niaj ntaŭaj cirkuleroj. Memkompreneble pro la iverseco de la lokaj kondiĉoj, ne ĉiuj egale ukcesis, sed ili de tio ne malkuraĝiĝu. Ili stu certaj, ke la klopodoj komencitaj ĉu ĉe omercistoj, ĉu ĉe hotelistoj, eĉ se ili ne ij liveras rezultaton favoran, jam efikas al o, ke tiuj rondoj ekscias pri U. E. A. kaj stas atentiga aj pri ĝia signifo. La kampo stos do pli bone preparita por postaj klopodoj Kelkaj Del. & Subdel. pleodas pri la anko de nacilingvaj broŝuroj pri U. E. A., peciale redaktataj por praktitaj rondoj. Tiu anko estas nun forigata por la ĉefaj naciaj ngvoj. Ni tre esperas, ke niaj kunlaborantoj zos de nun nian propagandilon en nacia ngvo, speciale por varbi Esp-iajn entreprenojn kaj precize konigi tion kion nun povas lili U. E. A.

Kelkaj Del. ne provis la klopodojn priskritajn, ĉar ili opinias, ke Esperanto ne sufiĉe isvast ĝis en ilia loko. Ili ne forgesu, ke nia socio ne estas poresperanta, sed perespeanta, ke ni nenion petas *por* Esperanto, sed ur proponas difinitajn servojn, interŝanĝe e kotizajo. Por ke firmo aliĝu al U. E. A. i tute ne bezonas ŝati Esperanton; nur ecesas, ke ĝi konu niajn servojn kaj deziru in provi.

En sama rilato, aliaj Del. ŝajnas miri, ke iaj bultenoj priparolas demandojn ne pure oresperantajn (ekz. junuloj dungado, vojaĝo e junuloj eksterlanden, k. c.) Al tio ni ovas nur ripeti, ke U. E. A. celas la uzadon e Esperanto, sed ne ĝian senperan propagandon, ke ĝi celas la kreon de internaciaj ervoj kaj por tio uzas Esperanton ĉar la iver-lingveco estas la plej granda baro por starigo de tiuj servoj.

Ekster tiuj manketoj, la respondoj estas enerale tute kontentigaj kaj atestas pri la rvoro de niaj kunlaborantoj, ilia kompreno e nia programo kaj ilia deziro ĝin realigi, u laŭ siaj fortoj.

∴ La Del. & Subdel., kiuj ne ankoraŭ sendis sian respondilon, ricevis avertilon pri tio i bonvolu nepre sendi la respondilon, kiaj n estas la rezultatoj de iliaj klopodoj.

Novaj Subdelegitoj.

Basra (Indujo). — S-ro Mühlenpfordt /o Robert Wœnkhaus & Kio).

Belgrad (Serbujo. S-ro J. Nevadovie , Icleni Venac).

Chézard (Svisujo) — S-ro Edgar Uniébaud.

Haarlem (Holando). — S-ro Y. H.-W. Harmehl (30 Kinderhuissingel)

Jonkœping (Sved.) — S-ro G. Fundbergh.

Lulea (Sved.). — S-ro K.-E. Franson (Stertan, 25).

Pont-Audemer (Eure, Franc.). — S-ro Deschamps.

Pornik (Loire-Inf., Franc.). — S-ro E. Bourn.

Prairie du Chien (Wisc., Usono). — S-ro S. Cray.

Straŝin (Bohem.). — S-ro L. Henych (po t hnbec).

Sume (Sved). — S-ro J.-E. Smidberg.

Szolnok (Hungar.). — S-ro Dro Feher Mihály.

Voiron (Isère, Franc.), — S-ro Pro Toury , rue Montgolfier)

Entute 650 lokoj, 206 Del. kaj 465 Subd.

Ŝanĝoj : La Del. de *Wien* estos de nun S-ro E. Soŝ, Tuchlauben, 18. — Oni korektu la Jarlibro Gmund per *Gmunden* (Oberösterreich). — La Del. de *Limoges* estas n Sro Lamant, antaŭe Viciel. (rue des etites-Maisons). — La Del. de *Hannover* as nun S-ro Gottgetreu, Rundestr., 13.

Esperantiaj Entreprenoj

(3a Listo)

Firmoj :

Agentejo Cook, *London* (Angl.).

Internacia Traduka Oficejo, Bigalke. ohnwinkel, Schleinitzstr, 60 II, *Bromberg*.

Librejo « Esperanto », A. Saharof, Tverskaja, 28, *Moskvo*.

Kaŭkaza Kompanio por vendado de Apokaj Komercajoj, *Tiflis*.

Institucioj :

Instituto Chevé, 36, rue Vivienne, *Paris*.

Departemento Oficprovizejo, *Tarnobrezg* (Galicio).

Gazetoj :

Ruslanda Esperantisto, Nevskij, 40, *Peterburgo*,

Societoj :

Franca Societo por la propagando de Esperanto (S. F. P. E.). Prez : Th. Cart, 12 e Soufflot, *Paris*.

Bohema Unio Esperanto (B. U. E.). Prez : Ĥradil, Café Union, *Praha*.

Federacio de la Esperantistaj grupoj Burgonio. Prez. : Ford; Sek : H thouillet, *Beaune* (Franc.).

Grupo Esperantista de Avignon. Prez : de Casteljan ; Sek : Châtelet, 4, rue des Etuves, *Avignon* (Franc.).

Grupo Esperantista de Bordeaux. Prez : Dro Bergonié ; sek : Marly, 11, rue Saubat, *Bordeaux* (Franc.).

Grupo Esperantista de Saint-Etienne. Prez : P. Maurin ; sek : Peyraud, *St.-Etienne*, (Franc.).

Grupo Esperantista « Verda Stelo » de Chalon-sur-Saone. Prez : Griveaux ; sek : Mary, place du Châtelet, *Chalon-sur-Saône*, (Franc.).

Grupo Esperantista de Macon, Prez : Collot, notario, *Mâcon* (Franc.).

Hoteloj :

Aix en Othe : *Hôtel du Commerce.*

Bengtsfors : *Hotel de Bengtsfors.*

Davos (Svis) : *Hotel Rhaetia.*

Franfkurt a/M. : *Hotel Anton*, Niedenau, 12.

Krakow : *Pensionhotelo*, Walskastr, 6.

Lausanne : *Pensionhotelo Ste-Luce*, stacidomo.

Meggen (Svis) : *Esperanto Paradizo.*

Paris : *Hôtel International*, 11, rue Bachaumont.

Rochefort (Belg.) : *Hôtel Biron.*

Teruel (Hispan.) : *Hotelo Jose Montesinos.*

Tarnobrczg (Galicio : *Hotelo Bazar.*

Entute 61 Esperantiaj Entreprenoj.

Fako IIa : FINANCOJ

Monata raporto : Etato de la Financoj dum monato majo

	Enspezoj	Elspezoj
Fako administrado ..... $	186 73	28 70
Subfako Varbado.........		1 89
Subfako Varbado.........		51 36
Fako Financoj	23 31	2 24
Subfako Ekspedado.......		6 73
Fako komerco............	26 52	81 12
Subfako Ekspozicioj......		74 48
Sumoj..............	236 56	246 52
En kasoj la 1an de majo...	268 50	
En kasoj la 1an de junio...		258 54
Bilanco...........$	505 06	505 06

Dum la monato majo la antaŭviditaj enspezoj estis $ 250,33. La enspezitajoj do malsuperis la antaŭviditajn enspezojn je $ 13,77.

El la Sm 258,54 kiuj ni havas en la kasoj ni ŝuldas por diversaj fakturoj (insignoj, presajoj, premioj, k. c.) proksimume Sm 200, grandaparte jam pagitajn aŭ pagotajn dum monato junio.

Konstanta mondonacado por U. E. A.

Ni havos gravajn enspezojn dum venontaj monatoj : nova eldono de jarlibroj, de insignoj, eldono de anglolingva kaj ruslingva propagandaj broŝuretoj, kongresaj elpsezoj (organizo de vojaĝoj k. c).

Ni do nin turnas al niaj samideanoj, petante ke ili ne forgesu, ke la konstanta mondonacado por U. E. A. estas ĉiam malfermita. Ni rememorigas al ili, ke laŭ la regularo, ĉiu persono kiu donacis almenaŭ 10 Sm estas bonfarinto membro de Esperantio.

Jen la listo de la donacintoj dum monatoj aprilo kaj majo.

S-roj	Fisher (Tiflis)........Sm	2 40
	Tessier (Dresden).......	0 72
	P Kastner (Genève).....	6 »
	Dietrich (Brünn)........	0 84
	Jannasch (Leipzig)......	1 60
	Arre (Linkoping).......	1 04
	Sumo.............	12 60
	Antaŭaj sumoj (korektita)	540 13
	Tuta sumo ... Sm	552 73

Mondonacado por Sicilianoj.

Ni ricevis el S-ro Delegito Vogler el Hamburg la monsumon da Sm 5 kiel donacon de G. E. S. por la suferintoj de Sicilio. Tiun monsumon ni sendis, jam la 17an de Aprilo, al la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco en Genève, sed ĉar ĝi alvenis iom malfrue, post fermo de tiu monkolekto, ni forgesis ĝin publikigi en « Esperanto », oni bonvolu ni senkulpigi pri tiu forgeso.

Fakturoj al niaj Delegitoj kaj Subdelegitoj.

Ni rememorigas al niaj Delegitoj kaj Subdelegitoj, kiuj havas debiton da pli ol 1 Sm, ke ili ricevos fakturon de la Financa Fako de U. E. A., kiel kutime, en la unuaj tagoj de julio. Ili bonvolu kiel eble plej rapide sendi la de ili ŝulditan monon al *Esperantio, 8, rue Bovy-Lysberg Genève (Svisujo)*.

Tiu fakturo enhavos la kotizajojn de la Esperantiaj entreprenoj de la regiono de la Del. au Subdel. al kiu ĝi estos sendata. Ili bonvolu do klopodi, se tiu ne estas jam farita, por ke la diritaj kotizajoj estu tuj pagataj.

La Financa Fakestro,
Th. Rousseau.

Fako IVa : ESPERANTO OFICEJOJ

Raporto pri la stato de la Esp. Of.

La Komitatano de fako Esperanto-Oficejoj riceyis de la Del. kaj. Subdel. 140 respondojn al la cirkulero demandaro, sendita dum Aprilo 1909. Laŭ ili estas fondita novaj Esp. Oficejoj en la 59 jenaj lokoj : Abbeville, Altendorf, Annecy, Bad. Reichenhall, Bellegarde, Bern, Bologna, Brighton, Bromberg, Budapest, Charlottenburg, Coventry, Dijon, Dover, Dublin, Evansville, Hastings, Karlsruhe, Krakow, Le Locle, Lohmen, Lomnice, Louhans, Lübeck, Lightctiffe, Mexico, Mindelheim, Misido, Moreuil, M. Ostrau, Moulins, Napolo, Northampton, Noury-Bedzin, Nuits, Praskaĉka, Prostejov, Redon, Roanne, Rostock, Rothesay, Salem, San Sebastian, Saint-Meard-de Drome, Schweinfurt, Sebnitz, S. Gravenhage, Sheffield, Silistria, Stuttgart, Syran, Taillette, Tarnobrczg, Teruel, Tortoza, Tübingen, Tulle, Vichy, Worms, Würzburg.

El ili 16 estas plene organizitaj ; en 53 el ili troviĝas unu persono, kiu parolas Esperante. La adresoj de ĉiuj Esp. Of. novaj kaj malnovaj kun ĉiuj korektoj aperos en la 3a aldono de la Jarlibro. En tiu aldono, la Esp. Of ĉe kiuj iu parolas Esperante estos montrataj per litero *p.* Ĉar malmultaj Del., en kies urboj jam ekzistas Esp. Of. respondis la cirkuleron, ili bonvolu respondi tuj pri la demando, ĉu iu parolas Esperante ĉe la Esp. Of. La suma nombro de la Esp. Of. estas nun 162 el kiuj 79 plene organizitaj. Ni tre dankas ĉiujn Del. & Subdel., kiuj bonvolis respondi nian demandaron ĝustatempe.

Fako Va : TURISMO

Alkongresaj vojaĝoj.

Por la unua vojaĝo la Fako Turismo proponas jenan vojon : Varsovio Berlin-Frankfurt-Strassburg - Lyon - Marseille - *Barcelono* - Port Vendres - Toulouse - Bordeaux - Paris-Aachen-Berlin-Varsovio. Laŭvole la vojaĝantoj povos uzi saman vojon por iro kaj reveno. *Haltoj* : *irante* ; en Frankfurt (Ekspozicio) Lyon (1 tagon) ; *revenante* : Paris, Bad Godesberg Berlin.

Pri detaloj oni sin turnu al Sro Dr. M. Kandt, Handelskammersyndikus, Bromberg

La kongresontoj el Aŭstrujo sud-orienta Germanujo alveturos al Lyon tra Buchs (Romanshorn) Zurich-Bern-Genève kaj renkontos la aliajn en Lyon. Halto laŭvola en Bern aŭ Genève.

Dua vojaĝo : Boulogne (kaj Bruxelles) Paris - Bordeaux-Toulouse Port Vendres-*Barcelono* - Hendaye - St-Nazaire (aŭ Cherbourg)-Havre-Boulogne. Haltoj en Bordeaux kaj Paris.

Tria vojaĝo : Vaporŝipe al Hamburg rekte al Valencia. Forveturo el Hamburg la 24 Augusto per vaporŝipo « Stambul » de la Levante-Linio. Prezo de la bileto ĝis 80 Sm. Vizito de la Ekspozicio en Valencia. Reveno aŭ fervoje kun vojaĝo unua aŭ vaporŝipe sur sama vojo.

Pri detaloj de tiu vojaĝo sin turni al Sinjoro Delegito W. A. Vegler, Rathausstrasse 16I Hamburg. Oni mendu la bileton kiel eble plej baldaŭ.

Pri biletprezoj kaj preciza horaro ni povos sciigi nur post kelkaj tagoj en la venonta numero de Esperanto.

Intertempe oni dissendos invitcirkuleron al ĉiuj petantaj ĝin ĉe la subskribinto, aŭ ĉe Esperantio, 8 Bovy-Lysberg Genève.

Bern (Esperantio) 1 Julio 1909.

J Schmid.

Fako VIa : KOMERCO ET INDUSTRIO

Reklama Subfako.

Ni informas ĉiujn Esperantiajn entreprenojn, ke la sidejo de la *Reklama Subfako* de U. E. A estas translokigata je la jena adreso : S-ro *Balandra, Chalon-sur-Saône* (Francujo). Oni do bonvolu sendi al ĉi tiu adreso ĉiujn pakajojn de reklamiloj difinotaj por la dissendado al la Del. de U. E A. Ĉe la sama loko estas la ekspedejo de U. E A.. La tarifo restas same kiel antaŭe. Pri tiu subfako oni legu ĉiujn detalojn sur paĝoj 35-36 de la Oficiala Jarlibro.

Fako VIIa : JUNULOJ

Raporto pri Bulteno no 2.

La demandaro de Bulteno no 2 estis jena : 1. Ĉu vi komunikis al la lernejestroj la leteron senditan kun la Oficiala Bulteno no 1 ? — 2. Ĉu vi sukcesis instigi Esp. kurson por gejunuloj en via loko aŭ ĉu jam estas tia kurso? — En kiuj lernejoj? Kiom da lernantoj? Ĉu la lernantoj aliĝis al U. E. A ? — Bonvolu kunsendi la liston de de la gejunoloj, kiuj : *a)* deziras korespondi, *b)* vojaĝi dum libertempo eksterlanden, *c)* restadi libertempe en eksterlandaj familioj, *d)* trovi oficon eksterlande. — 4. Ĉu vi konas Esp. familiojn, kiuj akceptus fremdan junulon (aŭ junulinon) dum libertempo por ellernado de enlanda lingvo?

Ĝis nun respondis 65 Del. la transdonitan bultenon. La nombro de la lernantoj en kursoj kaŭzitaj per U. E. A. estas entute *841*. El ili fariĝis Esperantianoj ĝis nun 70. Precipe favore oni akceptis nian klopodon en la sekvantaj urboj ; Beaune, Aix-en-Othe, Tilsit, Annecy, Moulins, Nuits, Braunschweig, Praha, Halifax, Siedlce, Vladikaukaz, Halifax, Teruel, Serpuĥov, Helsinborg, Lausanne, Gent, Moresnet, Sens, Limoges, Davos. En multaj aliaj urboj la letero estis komunikita al la lernejestroj. La rezultato de ĉi tiu klopodo estas do ĝenerale kontentiga, tiom pli ke ĝi unuafoje estis farita. Deziras korespondi plej parte per ilustritaj poŝtkartoj 48 gejunuloj. Kelkaj deziras restadi libertempe en eksterlandaj familioj, kelkaj serĉas oficon eksterlande kaj kelkaj familioj volonte akceptus aŭ interŝanĝus junulon dum libertempo. La junula fako de U. E. A. zorgas nun pri tiuj petoj, kiujn oni povos legi en tiu No. — Universitatan gvidfolion oni eldonos en Birmingham, Dijon, Debreczen, Genève, Neuchatel kaj Praha.

∴ Nia fervora Delegito S-ro Backmann, el Helsingborg aranĝos en Aŭgusto vojaĝon kun 10 junulinoj tra Kopenhagen kaj kelkaj germanaj urboj. Inter illi estas : Kopenhagen, Hamburg. Hannover, Magdeburg, Leipzig, Dresden, Berlin haj Lübeck. La Esperantiaj Delegitoj kaj precipe la Konsuloj por junuloj estas petataj varme akcepti kaj helpi la svedajn vojaĝantinojn laŭ sia tuta povo.

Esperantiaj Informoj

Amsterdam (Holando). — En Amsterdamo jus komenciĝis du kursoj por policanoj kun sume 40 partoprenantoj Tio signifas grandan antaŭenpaŝon por Holando Ĉiusemajne nin vizitas fremdlandaj Esperantianoj, kiujn ni helpas, kondukas laŭpove, k. c. De nun la estraroj de Tipografista Ligo (adr. Kloveniersburgwal 56) kaj de ligo Marista (adr. Kattenburgervoorstrat 2), korespondas Esp.

W. N.

Beaune (Franc.). — *Komitato de la Burgonja vino.* — Ofte la nefrancoj estas embarasataj, kiam ili deziras provizi sian kelon per bonaj vinoj. Kie trovi fidindajnn informojn ? Tute simple skribante al la Prezidanto de la Burgonja vino, S-ro Léonce de Montille en Beaune. Ankaŭ oni povas sin turni al S-ro Mathieu, unu el fondintoj, direktoro de la Enologia Stacio (scienca laborejo por la studo de la vino), kiu ĉiujare malfermas kursojn dusemajnajn sekvatajn de progresemaj vinbienuloj komercistoj francaj kaj fremdaj. La Komitato, kies estraro konsistas el la plej honorindaj negocistoj ne vendas vinon. Nur ĝi propagandas por konigi kaj ŝatigi la Burgonjajn vinojn, precipe per donacoj. Jam ĝi senpage sendis milojn da boteloj en multnombraj oficialaj festenoj kaj regionaj aŭ internaciaj Kongresoj. Ekzemple la Komitato afable donacis grandan kvanton da plej bona vino por la kongresa festeno, kiu okazis en Beaune, la 2an de majo. Tiamaniere la trinkintoj allogitaj klopodas por aĉeti saman bonegan vinon kaj sin turnas al la esperantema prezidanto, kiu tuj sendas la oficialan liston de la firmoj aliĝintaj al la Komitato de la Burgonja vino.

La Delegito : D-ro A. Vesoux.

Dublin (Irlando). — Fervore tie laboras por U. E. A. Sro Jameson Johnson, nia Del., kiu varbis jam 26 membrojn. Fondiĝis Esp. of. ĉe librejo Hanna et Neale (18 Nassau Str).

Falun (Sved.). — Esperanto kaj Esperantio progresas en Falun. La nombro de esperantianoj pligrandiĝas. — La 16-19 de junio okazis grava tutsveda kunveno de instruistoj. Tiam faris paroladon pri Esperanto kiu U. E A, adjunkto Zachrisson el Karlstadt, Subdel. de U. E. A. kaj verŝajne baldaŭ nova prezidanto de Sveda Esp. Societo. Tio estas tre grava, ĉar dum la tuta kunveno okazis krom tiu ĉi nur unu parolado.

Antaŭ kelka tempo la Del. dissendis al 30 lokoj en Svedujo proponojn kaj multaj certe sendis sian aliĝon rekte al Genève. — Kiam la nombro de esperantiaj lokoj estos sufiĉe granda en Svedujo, ni dividos la landon en regionoj kun po unu Delegito kaj Subdelegitoj kaj enpresigos anoncojn pri U. E. A. en gravajn jurnalojn.

F. S.

Genovo (Ital.). — Ĝis nun tiu grava havenurbo restis ekster nia afero. Fondiĝis nun grupo kaj ekzistas Subdel. por U. E. A., kiuj komencas agi por U. E. A. Oni esperas bonajn rezultatojn.

Gera (German). — Ĉiumarde gastotablo en kafejo « Koisisano »; jurnalo « Esperanto », tie legebla. Afiŝa elmontro atentigas pri tio. — Fremdlandanoj, kiuj volas studi germanlingvon trovos en Gera bonajn institutojn kaj pensionojn. Naturo kaj arto interligiĝas por havigi amuzan restadon. Monteta ĉirkaŭajo logas al veturado kaj migrado.

Liège (Belg.). — Nia nova Subdel. Sro Lebau, por komenci sian agadon publikigis en grava belga gazeto, « la Depêche » tre plenan artikolon pri U. E. A. kaj ĝia nuna utileco, kun traduko de nia Esp. propagandilo.

Limoges (Franc.) — La Delegito de U. E. A. sciigas al ĉiuj esperantistoj kiuj iros al Barcelono, ke ili estos kore akceptataj de la tiea esperantistaro. Ili nur bezonos konigi la horon de sia alveno, al la Delegito kiu sendos Konsulon par ilin atendi ĉe la stacidomo. Oni preparas akcepton por la traveturontoj Kongresanoj.

Medina (Hispan.). — La Esp. Grupo Medina intencas montri dum la venonta septembro, la disvastiĝadon de U. E. A. tra la tuta mondo kaj sekve Esperanto. Por tio ĝi volas fari malgrandan esperantan ekspozicion kaj bezonas materialojn. Nia Delegito en tiea urbo petas al la Delegitoj kaj Subdelegitoj de U. E, A. ke ili bonvolu sendi al li poŝtkartojn (eble vidajojn de urboj), prospektojn kaj aliajn. Same li petas al la esperantaj gazetoj, kelke da ekzempleroj k. t. p. Adresu : Sinjoro Frederico Garcia y Diaz. Delegito de U. E. A. - Medina del Campo (Hispan.).

Moskvo (Rus). — La Instrua Fako de la Societo por la Disvastigo de Teknikaj sciencoj en Moskvo starigis « Komitaton por Instruaj Ekskursoj ». Tiu ĉi Komitato aranĝas en la nuna jaro vicon da rondvojaĝoj eksterlanden speciale por instruistoj. La partoprenantoj estas dividataj en grupojn, elveturantajn unu post la alia, ĉiu gvidata de kompetentulo Pro diversoj kaŭzoj, en tiu ĉi jaro, la supre nomita komitato ne uzis la servojn de U. E. A., komisiante ĉiujn klopodojn al siaj propraj agentoj, ankaŭ homoj ideaj, laborantaj senprofite. La Del. de U. E. A. en Moskvo opinias tre dezirinda por diskonigi kaj ŝatigi nian Asocion, ke niaj Del. et Subdel. proponu al la vizitontaj grupoj da instruistoj, siajn servojn pere de la loka agento, tute sendepende ĉu en koncernaj grupoj partoprenas esperantianoj kaj esperantistoj aŭ ne. Kompreneble la afero postulas aparte multe da takto, por ke la nomitaj agentoj ne pensu, ke ni intencas forpreni iliajn rajtojn. Se ni sukcesos provi la utilecon de U. E. A., estas eble ke la venontan jaron la grava dirita institucio akceptos uzi la servojn de nia Asocio. Nia Del. en Moskvo pendigis en la organiza oficejo grandan anoncon pri U. E. A., direktantan la interesatojn al la. Esp.-Oficejo, starigis tie tablon kun propagandilojn kaj al la Del. loĝantaj laŭlonge de vojiroj de la karavanoj, dissendis cirkuleran leteron, kiun ni insiste rekomendas al ilia atento kaj prizorgo. Entute vojaĝos dum tiu ĉi somero ĉirkaŭ 1.200 geinstruistoj. Se la afero sukcesos, oni intencas organizi estonte arojn da similaj ekskursoj por ĉiuj dezirantoj. La interrilatiĝo kun la Organiza komitato prezentas por nia Asocio grandegan intereson ; pro tio nia Del. faris ĉion laŭpovan por kovinki ĝin pro la utilo, kiun ni povus liveri ; kompreneble nun la afero ĉefe dependas de la Del. de la trapasotaj urboj.

München (German.). — En tiu urbo niaj samideanoj renkontas diversajn malfacilajojn, kiujn ili esperas baldaŭ venki. La grupo aliĝis kiel Esperantia Asocio ; ĝi estus tre feliĉa, se la trapasantaj Esperantianoj bonvolus ĝin viziti, precipe irante al la kongresurbo.

Nuits (Franc.). — La fameco de tiu regiono estas sufiĉe konata de ĉiuj, por ke la Del. silentu pri tio, ĉar neniu leganto nescias ke la provinco « Burgonio » unu el la plej riĉaj de Francujo, ŝuldas sian riĉecon al la tutmonda bonfamo de siaj vinoj, kies senegala superkvalito estas universale konata. Preskaŭ ĉiuj geesperantianoj de nia regiono estas bienhavantaj vinberkulturistoj. Tial tie ĉi la Del. proponas sin, kiel peranton inter la vinproduktantoj kaj la vinkonsumantoj. Lia rolo nur konsistos transdoni kaj traduki la mendojn al geesperantianoj de lia regiono kaj doni al vi la informojn kiujn vi bezonos. Li opinias ke agante tiele, t. e. rilatigante senpere kun la produktantoj, li ebligas ŝatindan profiton ĉar ni neniigas la makleristojn, kies servoj estas subportataj de la aĉetantoj, kaj la revendistojn kaj vintenejojn, kiuj tro ofte aliigas kvaliton de la komercajoj. Por ĉiuj informoj sin turnu al la Del. de U. E. A., S-ro J. Moron (Nuits, Côte-d'Or).

J. M.

Troyes (Franc.). — Ni estas feliĉaj konigi al niaj Del. kaj kunlaborantoj la bonegan iniciaton de Sro Doré, Vicdel, en Troyes. Leginte en ESPERANTO la artikolon pri « Polaj terlaboristoj en Francujo », Sro Doré interrilatiĝis kun la Del. de U. E. A. en Krakow, kiu per la labora Oficejo de Krakow konigis la la laborkondiĉojn de la polaj terlaboristoj, kiuj dezirus veturi Francujon por plenumi kampajn laborojn. Tiu kontrakto estis publikigita en la lokaj gazetoj de Troyes kun la informo, ke tiuj agrikulturistoj kiuj dezirus dungi kamplaboristojn sin turnu ĉe la Esperanto-Oficejon, kie sur speciala registro ili povos enskribi siajn petojn, kiujn la Del. transdonos al la Labora oficejo ĉiam per U. E. A. Tiu artikolo liveris tre bonajn rezultatojn. Oni anoncas aliparte, ke kelkaj el tiaj terlaboristoj lernas Esperanton kaj per ĝi povas pli rapide sin komprenigi de la interesatoj. La artikolo de Sro Doré (Esperanto utila al terkulturistoj) estis sendita al ĉiuj niaj francaj Del., kiuj estas insiste petataj ĝin represi en la gazetoj de sia loko, malfermi ĉe la Esp.-Oficejo registron por la petoj kaj rilatiĝi kun nia Del. en Krakow. Oni estu certa, ke tiamaniere oni efike laboros por nia afero kaj preparas por ĝi vastan kampon de agado. Tio aliparte instigu niajn Del. pli ofte sendi al ni artikolojn de vere praktika signifo.

∴ La Esp. grupo de Troyes ankaŭ eldonis belan ilustritan gvidlibreton tre bone aranĝitan Ni ĝin havigos al la petantoj.

Vichy (Franc.). Dro Clerc, Subdel., anoncas al ni ke *Esperanto* rangoprenos inter la gravegaj kaj elektitaj tutmondaj ĵurnaloj, kies alilanduloj disponadas en la legosalono de la Kazino de Vichy. Imitinda ekzemplo ! Oni scias, ke ĉiujare veturas al Vichy multego da vizitantoj. Aliparte la tiea Esp. grupo eldonis tre bonan *gvidlibreton* (laŭ mono-formato) tra Vichy kun ilustrajoj kaj plano de l'urbo. Postulu ĝin persone aŭ poŝte ĉe nia Subdel., Dro Clerc, 10, rue des Célestins.

ESPERANTIA PAROLEJO

Alvoko al ciuj Postoficistoj

Sekvante la belan ekzemplon de la francaj fervojistoj ni dezirus fondi internacian asocion de Poŝtoficistoj.

Al ĉiuj niaj karaj samideanaj gekolegoj ni do proponas la projekton organizi : *Universala'n Poŝtoficista'n Asocio'n.* Tiu asocio samtempe havos memstarajn grupojn en ĉiu lando

Sed sciante ke nenio povas sukcesi sen la

interŝanĝo de opinioj inter si, ni petas ĉiujn, kiujn konsentas kun nia propono, ke ili bonvolu skribi al ni ĉion, kion ili pensas pri tiu afero, sendante projektojn kaj informojn kiujn ni tre dankeme akceptos.

Karaj gekolegoj de ĉiuj landoj sendu vian adreson :

al S^ro S. L. Frantz
21, rue Alain Chartier
Parizo

aŭ al S^ro Lafon
95, rue du Bac,
Parizo.

Mil dankojn antaŭe !

Atentu francaj Delegitoj !

Post artikolo en gazeto *Esperanto* pri polaj laboristoj en Francujo, S-ro Delegito Rudnicki, Krakovo, trovis kelkajn laborserĉantojn. Inter ili estas ankaŭ kelkaj studentoj mezlernejaj, kiuj intencas dum sia libertempo veturi Francujon, por trovi tie ian eĉ ordinaran laboron, por kompensi la vojaĝkostojn kaj vivkostojn dum tiu ĉi tempo, kaj samtempe iomete lerni la francan lingvon.

La libertempo komencos jam *en fino de Junio* kaj daŭros ĝis Septembro. La laboro povos esti terkulturado, kulturado de floroj, fruktarboj, vinberoj, en fabrikoj, k. t. p. La studentoj povas esti dissemitaj en tuta Francujo.

La francaj Delegitoj bonvolu baldaŭ doni tute detalajn kondiĉojn koncerne salajro, vojaĝkostoj kaj vivrimedoj, kaj ankaŭ montri la plej proksiman kaj malmultekostan vojon. Ĉiujn respondojn oni adresu al Sro Ladislav Rudnicki, *Krakovo*, Kopernik, str. 17, Esperantia Delegito.

La diritaj studentoj fariĝis esperantianoj laŭ la konsilo de nia fervora Delegito S ro Rudnicki. Nun mi petas ĉiujn Delegitojn kaj precipe la konsulojn por Junuloj kore akcepti kaj helpi la junajn polajn samideanojn laŭ plej bonaj fortoj.

En la espero, ke la afero bone sukcesos, mi petas la konsulojn por junuloj poste raporti al mi pri la afero.

Por Fako Junuloj :

G. Rockmann.

Ni insiste petas ĉiujn niajn Del. & Suldel., ke ili faru sian tutan eblon por helpi kaj utili al tiu plej interesa entrepreno.

Pri markoj

La propono de S-ro Zakrjevski (1) estas tre praktika kaj mi povas nepre konsenti al ĝi, se mi ĝin ĝuste komprenis, nome tiel, ke oni uzos la markojn kiel pagilojn. La pagadmaniero inter la diversaj landoj montras ja ĉiam malfacilaĵojn, certe pli ol inter la loĝantoj de unu lando. Tiujn malfacilaĵojn oni povas plejgrandparte eviti per markoj uzeblaj kiel pagiloj. Ili devus esti presataj kaj vendataj de U. E. A. kaj havi malsamajn valorojn. En ĉiuj landoj la markoj devus esti aĉeteblaj en la ejoj jam nomitaj de Sro. Zakrjevski, sed precipe en centra vendejo, kie oni ĉiam kaj certe ilin povus aĉeti. Se tiam iu Esperantisto deziras informon de alia, li nur bezonas aligi al sia letero tian markon havantan valoron de poŝtmarko necesa por respondletero. Ricevanto de tia letero sammaniere povas uzi la markon ĉe alia okazo. — Aŭ se Esperantiano ne mendas ĉe U E. A. aŭ abonas al gazeto, li tuj povas pagi per tiaj markoj kaj ne havas elspezon por transsendado de monsumo.

Samtempe mi atentigas la samideanojn al alia afero. Ekzistas eble multaj firmoj, kiuj reciproke korespondadas en siaj naciaj lingvoj sen scii, ke eble ĉe unu au alia firmo estas Esperantistoj. Nomaron de la firmoj korespondantaj Esperante la plej multaj el ili ne posedas, aŭ la nomaro ne jam enhavas ĉiujn firmojn. Ĉio tio ne estas malhelpa, se la sendinto surgluis sur sian leteron malgrandan signon tuj komprenebla por Esperantista ricevanto, kiel ekz. malgrandan markon kun verda stelo, eventuale kun enskribo « Esperanto » aŭ alia. La marko povus esti pli malgranda ol poŝta marko kaj ne devus havi propagandan surskribon, ĉar propagandajn markojn oni povas uzi en aliaj okazoj, eble ankaŭ surglui sur la koverton. Mi ĝojus, se la samideanoj, precipe tiuj kun spertoj el internacia korespondado Esperanta, ion dirus pri mia propono.

Kun Esperantiana altestimo !

W. Gellert,
Subdel. de U. E. A.
Hildesheim (Germ.)

(1) Vidu Esperanto de la 5^a de junio.

⁂ La unua propono de Sro W. Gellert estas certe tre praktika kaj jam estis farita de Sro Tellini. Ĝi estis eĉ provita de U. E. A., kiu devis ĝin forlasi, ne ĉar ĝi montriĝis ne praktika, sed, ĉar post enketo, ni konstatis, ke ĝi kontraŭstaras al naciaj leĝoj kaj povus okazigi malagrablaĵojn al nia Asocio. La proponita pagilo estus konkurenco al la ŝtataj poŝtmandatoj kaj pro sia pligranda oportuneco estus rapide preferata kio nedubeble fortirus monon el la ŝtataj kasoj. Ni do devas atendi por realigi tiun proponon. La ideo pri propaganda marko estas nun studata de la Komitato de U. E. A.

U. E. A.

Pri libertempo de Instruistoj

Mi pensas, ke multe, tre multe utilus al nia afero, se la instruistoj pasigus siajn libertempojn interŝanĝe ĉe siaj fremdlandaj kolegoj. Mi klarigos mian ideon pli precize : ekzemple mi dezirus pasigi mian someran libertempon (aŭ ĝian parton) en Danujo. Vi scias, ke instruistoj nenie estas riĉuloj. Ankaŭ mi ne estas riĉulo, sed nur simpla salajrulo. Kiel do aranĝi mian libertempan ekskurson al Danujo ? Mi prezentas al mi ĉi tion jene : Iu dana kolego, kiu volus konatiĝi kun mia lando kaj nacio, povas loĝi kaj nutriĝi ĉe mi dum la tuta libertempo (aŭ ĝia parto) *tute senpage*, kondiĉe, ke mi povos fari la samon ĉe li en la venonta jaro. Se la dana kolego loĝos ĉe mi, li tute ne bezonos scii aŭ kompreni la ĉekan lingvon kaj tamen li ricevos en mia lando ĉiujn informojn, kiujn li bezonos aŭ deziros ricevi. Kiel tio ĉi okazos ? Mi estos lia konstanta kaj ĉiea akompananto kaj la plej volonta kaj servema klariganto en ĉiuj aferoj, kiuj iel povas lin interesi. Se li dezirus vidi kaj studi la manieron de vivado de niaj vilaĝanoj, ni faros oftajn vizitojn en diversaj vilaĝoj (se ni mem ne loĝos en iu vilaĝo), se li havos intereson por la vivado en niaj urboj, ni ofte vizitos urbon (se ni ne loĝos en urbo), se li deziros vidi aranĝon de niaj lernejoj, diversaj institutoj, edukadaj aŭ aliaj, fabrikoj ktp., ni vizitados diversgradajn lernejojn, institutojn, fabrikojn ktp. — Tiel povos pasigi ĉe mi la dana kolego 2—3 semajnojn aŭ 1—2 monatojn — laŭ sia libera tempo kaj deziro. — Kaj kiom da mono li bezonos por tiu fremdlanda ekskurso ? Tiom, kiom estas bezone por veturi al mi kaj poste de mi. Se vizitos min dana kolego el ĉirkaŭaĵo de Kopenhago, li ne bezonos por tiu celo pli multe ol 60—70 kronojn (laŭ tio, ĉu li veturos al mi direkte per ordinara aŭ rapida vagonaro). — Kiu povas tiel malkare vojaĝi kaj pasigi *2 monatojn* en *fremda* lando? Krom fratigitaj kaj ĉiam servopretaj esperantistoj eble neniu ! — Tiel mi povos pasigi ĉiun duan jaron (libertempon) en alia lando Kiom ni instruistoj povus profiti el tiamaniera vojaĝado por nia scio kaj profesio ! Kaj la profito en efektiveco ne estos gajnita sole por ni mem, sed ankaŭ por ĉiuj niaj samlandanoj. Ĉar, se mi loĝos en Danujo 1—2 monatojn, ĉu ne interesos min vidi, krom aferoj lernejaj, ankaŭ labormanieron de tieaj kamparanoj, ĉu mi ne dezirus konatiĝi kun la metodo de iliaj laboroj ĉu sur la kampo ĉu en domoj, laktejoj, kokinedukejoj, bovinejoj kaj aliaj « ejoj » ? Mia kolego-akompananto klarigos al mi ĉion necesan per helpo de siaj samnacianoj, mi faros por mi skribajn notojn pri ĉio, kio ŝajnas al mi notinda kaj poste uzebla. Kiam mi revenos hejmen, mi povos fari multajn instruajn kaj informajn paroladojn por miaj kunloĝantoj aŭ verki artikolojn por la publiko pli vasta. — Kaj ĉu per tia agado mi nenion faros ankaŭ por Esperanto ? Mi estas certa, ke tiel mi senarmigos ĉiun dubulon aŭ kontraŭlon de Esperanto ne per vortoj, sed per nerefuteblaj faktoj, ĉar ĉiu povos preskaŭ palpi la utilojn kaj profitojn, kiujn alportas al ni nun jam solvita problemo de helpa lingvo internacia. — Se kelkaj el viaj kolegoj aŭ koleginoj dezirus pasigi siajn libertempon jam tiun ĉi jaron en mia lando, mi estas preta tuj entrepreni ĉion por plenumi ilian deziron. Mi anoncos en nia instruista centra organo, ke tiuj kolegoj-esperantistoj, kiuj deziras loĝi la proksiman jaron en Danujo (tute senpage !!), sendu al mi siajn adresojn k.t.p., k.t.p. — Ĉu vi volas fari simile ankaŭ en viaj gazetoj ?...

Th. Čejka.
(*Red. Pedagogia Revuo*)

Rimarko de la redakcio. Gekolegoj, kiuj volus akcepti dum la ĉefa libertempo la viziton (kiomtagan ?) de siaj fremdaj kolegoj aŭ koleginoj (por la reciproka vizito en la venonta jaro), sciigu senprokraste siajn adresojn kaj la tempon de la ĉefa libertempo al la redakcio de la supredirita gazeto

IX^a LISTO de ESPERANTIANOJ

kiuj pagis por 1909.

DUBLIN (41.83) — D. S-ro G. Jameson Johnston. — 1. G. Johnston. — 2. S-ro D-ro A H. Benson; 2. F-ino H. Shuter; 4. S roj D-ro G. P. Meldon; 5. W. V. Johnston; 6. S-ino W V. Johnston; 7. S roj, J. A. Burrow; 8. D-ro J. E Causland; 9 F-ino H. Reed; 10. S-roj J. Gilleman Moorhead; 11. D-ro R. H. Fleming; 12. F-ino O Rud; 13 L. Despard; 14. S-roj D-ro C. M. Benson; 15. D-ro W. F. Pim; 16. D-ro S. J. Bradshaw; 17. D-ro R. Atkinson Stonery; 18. D-ro W. J. de C. Wheeler; 19. S-ino G. E. Shanahan; 20. Kavaliro D-ro C. Ball; 21. S-ro D-ro C. Eccles; 22. F-inoj G. Pike; 23 F. Healy.

.... *Tuta sumo* : 23.

LONDONO-NORDO (42.1). — D. S-ro G. L. Browne. — 1. La Nord-Londona Esperanto Instituto; 2. S-ro G. L. Browne; 3. S-ino C. F. Browne; 4. S-roj A. R. Browne; 5. H. O. Browne; 6. F-inoj E. Godefrey; 7. M. R. Henningsen; 8. S-roj R. Wellard; 9. Harrison Hill; 10. F-inoj E. Hall; 11. J. Arnold-Browne; 12. S-roj Bodger; 13. J. Anderson; 14. S-ino Barragry; 15. F-inoj E. Barett; 16. D. Southward; 17. S-ro W. T. Burden; 18. F-inoj T. Gelman; 19. A. M. Nockles; 20. S-ino G. J. Booker; 21 S-roj Anderson; 22. Foster; 23. R. Harding.

.... *Tuta sumo* : 23

WIMBLEDON (42.21). — S. D. J ro W. W. Hide. — 1. Kolonelo Gale; 2. W. W. Hide.

.... *Hodiaŭa sumo* : 2 *Tuta sumo* : 3.

DEAL (42 23). — D. S-ro Ch. E. Cowper. — 1. S roj C. Cowper; 2. Jermyn J. E. C.; 3 S-ino S. Jermyn; 4. S-noj W. B. West; 5 H. B. Street; 6. E. L. Jackson.

.... *Tuta sumo* : 6.

BRADFORD (42.31). — D. S ro Tuke Priestman — 1. S-ro William Thistlethwaite; 8. M. D. Gronley; 13. F-ino E. Gee; 16 S roj R. Towmend; 17. G. Harison; 20. A. H. Ragg; 24. F-ino M. Parker; 35. S ro H. Barraclough.

.... *Hodiaŭa sumo* : 8. *Tuta sumo* : 21

BIRMINGHAM (42.48). — D. S-ro F. W Hipsley. — 1. S-roj F. Hipsley; 2 F. Hackett; 3. H Brown; 4. F-ino W W. Manton; 5. S-ro W. C. Amery; 6. F-inoj R G. Goldsmid; 7. C. C Goldsmith.

.... *Tuta sumo* : 7.

DRESDEN (43 211). — D. S-ro Dringer. — 6. S-roj K. de Frenckell; 7. D-ro A. Arnhold; 8. F. E. Boden; 9. F. Ader; 10. E. Lindenberg; 11. Sergius Winkelmann.

.... *Hodiaŭa sumo* : 6. *Tuta sumo* : 11.

DRESDEN (43.211). — D S-ro F. Radeck. — 1. S-ro F. Radeck; 2. S-ino E. Radeck; 3. S-ro H. Krauss; 4. F-inoj M. Eser; 5. J. Halm; 6. E Lindner; 7. C. Gerlach; 8. S-roj A. Schrœder; 9. A. Libal; 10. W. Müller; 11. C. Becker; 12. C. Ziegler; 13. C. Kiessling; 14. W. Pætzoldt; 15. W. Karsten; 16. F-ino Kæthe Pfennig; 17. S-ro W. Gross; 18. F-ino F. Voigt; 19. S-roj G. Wœrlge; 20. M. Langer; 21. H. Altermann; 22. F-inoj E. Jahn 23. E. Schœne; 24. S-ro M. Bœrner; 25. F-ino A. Wolf; 26. S-roj Erwin Frind; 27. R. Benke; 28. Q. Rœtschke 29. F-ino D Kreusch; 30. S-roj E Zimermann; 31. A. Hækenjos; 32. P. Kasper; 33. J. Schroer; 34. F-inoj J. Rietschel; 35. M. Munch; 36. S-roj F. Rosenbaum; 37. R. Schulze; 38. C. Handrich; 39. Th. Meissner; 40. J. Bartsch; 41 E Wünsche; 42. J. Schœniger; 43. F. Javurek; 44 C. Tschirschke; 45. M. Jahn; 46. E. Jahn.

.... *Tuta sumo* : 46.

BAD REICHENHALL. — S. D. S-ro F. Mayerhauser. — 1. F. Mayerhauser; 2. J. Hubersberger; 3. F-ino K. Yung; 4. C. Rapold; 5. G. A. Weismann.

.... *Tuta sumo* : 5.

WORMS (43.41. — S. D. S-ro H. Pfaff. — 6. Steiger; 7. Baier; 8. Pœtz; 9. Blum; 10. Hein; 11. Leydecker; 12. F-ino Holzweis.

.... *Hodiaŭa sumo* : 7. *Tuta sumo* : 12.

WIEN (43.61.1). — D. S-ro Hartwich. — 1. S. Werber; 2. K. F. Ahlgrimm; 3. F-ino W. Eterl; 4. S ro Kap-ano A. Engel; 5. D-ro M. Englænder; 6. A. J. Ostermaier; 7. Prof. O. Simon; 8. J. Hüch; 9. R. Weselik.

.... *Tuta sumo* : 9.

PRAHA (43.711). — D. S-ro V. Krauss. — 1. S-roj J. B. Novak; 2. J. Hondek; 3. F. Bartos; 4. D-ro S. Kamaryt; 5. K. B. Biskup; 6. J. Iglauer; 7. V. Krauss; 8. J. Ulehla; 9. J. Sykora; 10. J. Chalonpecky; 11. V. Jenicek; 12. H. Bouška; 13. J. Barvir; 14. D-ro F. Palek; 15. A. Kristof; 16. B. Vanickova; 17. F. Fuma; 18. C. Gernoch; 19. F-ino M. Krausova; 20. S-roj J. Trestik.

.... *Tuta sumo* : 20.

PRAHA-VII. — HOLEŠOVICE (43.711). — D. S-ro J. Svoboda. — 1. S roj J. Svoboda; 2. B. Dušek; 3. H. Beck; 4. F. H. Provasnick; 5. A. Kruby; 6. A. Fŭma; 7. A. Libal; 8. H Faltus; 9. J. Dundr; 10. J. Kaderabek; 11. A. Petriček; 12. J. Zabota; 13. K. Slenčka; 14. K. Morstadt; 15. F-ino P. Demlova; 18. M. Valenta; 19. A Libal; 20. F-ino M. Vanišova

.... *Tuta sumo* : 20.

DOUAI (44 284). — D. S-ro Alberic Humez. — 8. S-roj P. Desmoulins; 17. J. Quantin; 21. H. Mathurin; 20 E. Devred; 25. M. Pavot.

.... *Hodiaŭa sumo* : 5. *Tuta sumo* : 11.

BEAUVAIS (44.35). — 1. D. S-ro A. Grive; 2. Demarcy; 3. Monberg; 4. S-ino Bernard.

.... *Tuta sumo* : 4.

MANTES (44 36 9) — S. D. S-ro M. Poulard. — 1. S ro M. Poulard; 2. G. Schober; 3. J. Pommier; 4. A. Lhermite.

.... *Tuta sumo* : 4

BOURG (44.44 1). — D S ro Cl. Chevrot. — 1 Cl. Chevrot; 2. Venin; 3. F-ino M Ganeval; 4 S-roj J. Debost; 5. Rocchini; 6. G. Boyer; 7. R. Evrard.

.... *Tuta sumo* : 7.

SAINT-ETIENNE (44 58.12). — D. S-ro Gabert. — 1. S-roj E Gabert; 2. B Peyra[illegible]; 3. J. Jacquin; 5. L. Dévuns; 6. A. Sassol[illegible]; 7. J. Sabatier; 8. B. Bonnet; 9. J. Rivièr[illegible]; 10. J. Ferrière; 12. J. Dubouchet; 13. F-i[illegible] Chaquin; 14 S ino Gabert; 15. S-roj V. P[illegible]rache; 16. F-ino Renaud-Goud; 17. S-ro M[illegible]rin; 18. F ino L. Raffard; 19. M. Raffar[illegible]; 20. M. Desré; 21. B. Desré; 22. S ino M. Ch[illegible]meton; 23. S-ro P. Gordon.

.... *Tuta sumo* : [illegible]

Antaŭaj listoj	2.121
Sumo de la 9^a listo	223
Sumo :	2.344

La nombro de la Esperantianoj atingis 4.[illegible] la 1^an de julio.

Kaj nun, antaŭen al la Kvina milo !

BIBLIOGRAFIO

La **Geometrio « Folietara »** aŭ Nova te[illegible] rio geometria pri la movo l'korpoj en spa[illegible] de René de Saussure, (1^a parto). Prez[illegible] 0,25 Sm. Ĝenevo, Bovy-Lysberg, 8. — Ĝi [illegible] tas la 1^a parto de la tre grava originala scie[illegible] calaboro de fama samideano matematikis[illegible] D-ro René Saussure, nia Esp. Akademian[illegible] redaktoro de « Internacia Scienca Revuo » [illegible] Prez. de « Svisa Esp. Societo ». Pro ĝia sp[illegible] ciala scienca enhavo ni ne povas doni tie[illegible] detalan analizon, ni lasu tion al sciencul[illegible] matematikistoj. Ni nur diros ĝenerale, [illegible] dank'al tiu ĉi eltrovita de S-ro R. de Saussu[illegible] nova teorio, oni povas precize difini la dire[illegible] tojn de ventoj, la punktojn de aerturnoj, ci[illegible] lonoj sur nia terglob. Tio ĉi estas kompr[illegible] neble nur unu el multaj gravaj aplikoj, fu[illegible] damentotaj sur tiu ĉi nova teorio.

Tiu ĉi grava verko, dissendata de la aŭto[illegible] al ĉiuj samspecialaj scienculoj kaj scienc[illegible] societoj sendube havas ankaŭ grandan signi[illegible] fon por nia movado kaj nepre vekos inter[illegible] son al Esperanto inter la sciencularo.

Ni aldonu tie ĉi, ke S-ro R. de Saussure [illegible] donis kaj dissendis al ĉiuj scienculoj, part[illegible] prenintoj de l'IX^a Kongreso Internacia de Ge[illegible] grafio, okazinta en Ĝenevo pasintan someron[illegible] kaj al aliaj scienculoj kaj sciencaj Societ[illegible] la libron :

Traduko en Esperanto de la **Decidoj k[illegible] Deziroj** voĉdonitaj de la **Geografia Ko[illegible] greso** la 3, kaj 6 de Aŭgusto 1908, esper[illegible] tigita de R. de Saussure.

Ni ne bezonas klarigi, kiajn grandajn se[illegible] von nia sindonema samideano D-ro R. [illegible] Saussure faras per tio por nia afero.

Privat's Fifty Lessons. Conversation[illegible] Esperanto. By Edmond Privat, President [illegible] the International Institute of Esperantis[illegible] Price 1/6 net. Copyrigt. Stead's Publishi[illegible] House, Kingsway, London, W. C.

Vi jam vidas la nomon de tiu ĉi boneg[illegible] lernolibro kaj tial estas superflua mia deta[illegible] recenzo. La sistemo estas tre bona kaj im[illegible] tinda. Kvankam la libro estas verkita p[illegible] angloparolantoj, tamen ĝi estas preskaŭ tu[illegible] en Esperanto kaj ni varme rekomendas ĝ[illegible] ankaŭ al ĉiuj alinaciaj komencantoj, se i[illegible] deziras plej rapide scii paroli Eeperante.

Methoda Kühnlova. Uplnà Methodick[illegible] Učebnice Esperanta pro ŝkoby a. samouk[illegible] Pr. Kr. 2.40. Ankaŭ tre bona lernolibro p[illegible] Bohemoj, verkita de tre kompetenta, kona[illegible] Esp. S-ro Ed. Kühnl. La libro estas boneg[illegible] eldonita kaj bindita. Krom la detalan gram[illegible] tikon kun multaj klarigoj, ekzercoj kaj iom d[illegible] konversacioj, ĝi enhavas tre interesan apar[illegible] tan aldonon, *Deveno kaj Historio de Esperanto*[illegible] kie estas : Letero pri la deveno de Esp[illegible] paroloj de D-ro L. L. Zamenhof en malferm[illegible] Kunsidoj de Kvar Kongresoj, deklaracio p[illegible] Esperantismo, pri evolucio de Esperanto[illegible] himno Esp. La ideo kunigi la lernolibron ku[illegible] la historio de Esperanto estas laŭdinda ka[illegible] imitinda, ĉar unue, ĉiu Esperantisto deva[illegible] scii almenaŭ la ĉefajn historiajn momentoj[illegible] kaj la spiriton de nia movado, due ili tiam[illegible] niere nepre komencos tuj post la teori[illegible] ekzercoj la studadon de la lingvo laŭ pl[illegible] perfektaj, bonstilaj verkoj de la Majstro me[illegible] kaj tio servos kiel plej bona fundamento po[illegible] ilia plua perfektado en Esperanto.

Lingvo Internacia Esperanto. Lernlibro po[illegible] Turkoj. Paris, librairie Hachette et Cie, 79 B^d St-Germain, 1909. Prezo : Fr. 0,20. Tiu ĉ[illegible] malgranda libreto tre ĝojigis nin, ĉar ĝi estas l[illegible] unua lernolibro por Turkoj. Ni dankas l[illegible] anoniman aŭtoron, kiu verkis ĝin kaj la fi[illegible] mon Hachette, kiu ĝin eldonis. Ni esperu, k[illegible] post ĝi baldaŭ aperos multaj pli detalaj Esp[illegible] libroj por Turkoj kaj baldaŭ ni havos multe[illegible] nombrajn samideanojn el tiu ĉi renaskiĝint[illegible] progresema nacio.

D-ro J. Ostrovski.

JUNULA FAKO

Por utiligi U. E. A. al la junaj Esperantia[illegible] noj kaj plifaciligi internacian komunikiĝo[illegible] inter ili ESPERANTO kun la helpo de la fak[illegible] Junuloj de U. E. A. decidis komenci la jen[illegible] novan servon, kiun niaj Konsuloj por Junulo[illegible] bonvolu konigi kaj uzigi.

Ni *senpage* enpresos unufoje la nomon k[illegible] adreson de; a) la gejunuloj kiuj deziras kores[illegible] pondi per leteroj aŭ poŝtkartoj kum alidand[illegible] Esperantianoj ; b) de la gejunuloj, kiuj dez[illegible] ras vojaĝi eksterlanden dum libertempo ; c) d[illegible] la gejunuloj, kiuj deziras restadi libertemp[illegible] en eksterlandaj familioj ; d) de la gejunulo[illegible] kiuj dezirus trovi oficon ; e) de la Esperan[illegible] tistaj familioj, kiuj akceptus fremdan junulo[illegible] aŭ junulinon dum libertempo por ellernad[illegible] de la enlanda lingvo kondiĉe ke :

1^o Tiuj junuloj estu membroj de U. E. A ;

2^o Ili fi me promesu respondi almenaŭ un[illegible]

Esperanto-Movado

En nia lasta numero estis raporto pri la sukcesa « Dua Brita Kongreso » en Leeds. Nun ni donas koncizan priskribon pri la alia ne malpli grava nacia kongreso, **IV^a Germana Esp. Kongreso**, okazinta la 21-23 Majo en Gotha. Veturante en Gotha'n la kongresanoj vizitis la interesplenan urbon Weimar, kiun ili rondiris sub la gvidado de lokaj samideanoj. Inter tre multaj vidindaĵoj ili vizitis la « Domon de Schiller, « kiu estas konservinta tutan sian originalecon, la Gœthenacian muzeon, la statuojn de Liszt kaj Shakespeare, la gloran monumenton je l'memoro de senmortaj Gœthe kaj Schiller, k. t. p. En la kongresurbon niaj samideanoj venis tra luksa triumfarko kun surskriboj « Koran bonvenon » sur unu flanko kaj « Ĝis la revido » sur la dua. Ĵaŭdon estis la saluta vespero. La granda salono estis tute plena.

Prof. Rohrbach legas du telegramojn : unu de lia duka moŝto Carl Eduard, kiu bedaŭris, ke lia persona ĉeesto ne estis ebla kaj deziras al la kunvenintoj plej grandan sukceson, kaj duan de nia Majstro. Poste sekvas vico de interesaj muzikaĵoj kaj kantoj, humora « Esperanto kabaret », gajigaj prezentaĵoj k. c. Sekvantan matenon, solena malfermo de l'kongreso. Salutaj paroladoj de l ĉamberlana Moŝto v. Hæseler, de lia Ministra Moŝto D-ro v. Richter, k-j de Ĉefurbestro S-ro Liebetraŭ, salutanta la kongresanojn en la nomo de l'urbo. Sekvas longa vico de salutintoj de l'landligoj, de kelkaj fremdlandaj reprezentantoj ; poste oni legas dekkelkon da saluttelegramoj. La Kongreso mem sendis telegramojn al la Germana Imperiestro la Reĝo de Saksujo kaj la Duko de Sachsen-Coburg-Gotha. Fine bonege parolas Prof. D-ro Rohrbach, kiu tiel sindoneme kaj sukcese laboris por la aranĝo de Gotha Kongreso. Post la tre amika gaja komuna tagmanĝo, akompanata de multaj tostoj, sekvis la agada kunsido. Oni pritraktas la reorganizon de G. E. S. kiu estis nomita de nun Germana Esperanta-Asocio (G. E A.) ; nia konata samideano D-ro Mybs estis reelektita, kiel ĝia Prezidanto, D-ro Mœbus — Lübeck, vicprezidanto kaj D-ro Kandt — Bromberg, kiel sekretario kaj kasisto. La elektita konsilantaro konsistas el 16-18 agemaj samideanoj el diversaj ĉefurboj germanlandaj. S-roj Jean Borel kaj Prof. Schmidt estis elektitaj honoraj memboj. Por la V^a nacia Kongreso estas difinita la urbo Aŭgsburg. Vespere, D-ro Mybs faris kun granda sukceso propagandan paroladon. Sekvantan tagon la kongresanoj rondiris la urbon por vidi ĝiajn vidindaĵojn (Duka biblioteko, monera kabineto, muzeo k. c.) Post la komuna tagmanĝo okazis la ekzamenoj, la fakaj kunsidoj de l'U. E. A, de l'T. E. K. A., de l'ŝakludantoj, k. c. Fine la interesa vespero, dum kiu la prezentado de la unua akto de l'dramo « Gustav Wasa » de nia samideano S-ro Reinhold Schmidt kaj S-ro Ritter kun lia bona ĥoro pluzurigis la ĉeestantojn, kiuj danke multe aplaŭdis. Konklude oni ne forgesis, kompreneble, viziti la tradician « Ratskeller ». Ni ne forgesu pri la tre riĉa kaj bone aranĝita ekspozicio de plej diversaj esperantaĵoj, kie oni povis vidi tre interesajn 4 librojn de XVI^a jarcento, kiuj prezentas la embrion de nia afero, la pasigrafian sistemon kun bildo de l'Babela turo, kaj la libreton de Leibniz pri mondlingvo. Tiuj ĉi tre raraj verkoj estis kompleze pruntedonitaj el bibliotekoj de Gotha kaj Erfurt. Post la kongreso preskaŭ cent samideanoj faris ekskurson al Friedrichroda kaj Eisenach, belega parto de Turinga regiono, kie ili inter aliaj vidindaĵoj vizitis la faman kastelon « Wartburg », starantan, kiel agla nesto sur alta roko, kie dum longaj jaroj kaŝe vivis Luther, poste la fame konatan « Drachenschlucht » k. c. La revenantaj hejmen kongresanoj fine vizitis la urbon Chemnitz, kie ili havis veran plezuron ĉeesti, en la urbteatro, la prezentadojn en Esperanto de « La Gefratoj « (de Gœthe, trad. Grabovski), « La Geservistoj » (unuakta komedio de Benedix, kaj de ridiga burleskaĵo « La glavo de Damokles » (de Gustav zu Putlitz). Niaj Chemnitzaj samideanoj, kiuj perfekte ludis, kiel profesiaj bonaj aktoroj estis senhalte aplaŭditaj. Post tiu lasta plezuro, lasta programero de la Gotha kongreso, niaj germanaj samideanoj disiĝis por daŭri hejme ilian viglan laboron por nia grava homara afero. Bonan sukceson !

⁂

Kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn, okazas ankaŭ kelkaj kongresoj aŭ grandaj jarkunvenoj. En Francujo : La dua kongreso de la *Rodana Federacio* en *Vienne* (Isère), la 20 Junio, la *regiona kongreso* en *Tours* (centrokcidenta Federacio), la *regiona Kongreso* en *Condé* (Nord-Francujo) kiu okazos la 26 de Julio. En la Princlando de *Monako* okazis dum la Paska semajno kunveno, kiun partoprenis reprezentantoj el sep diversaj landoj. La 27 Junio la *I^a Kongreso de Belga Esp. Ligo* okazas en *Verviers*. La *Dana Esp. Ligo* aranĝas sian landan jarkunvenon en *Aarhus* la 13 Julio. Dum la fino de tiu monato, en *Bukaresto*, festos sian unuan kongreson niaj *Rumanaj* samideanoj. La *Poloj* energie laboras por la Esp. ekspozicio kaj kongreso nacia en *Ĉenstoĥovo* je l'fino de Aŭgusto aŭ tuj post la Barcelona kongreso. Ankaŭ tre vigle kaj energie, kiel ĉiam, laboras niaj *Bohemaj* samideanoj, por la sukceso de I^a Kongreso de Bohemaj Esp. en *Praha* 26.28 Septembro. Se ni aldonos la nombron de diversaj kongresoj, kiuj jam ĝis nun okazis dum la lasta printempo kaj atentos ilian ĉiam pli kaj pli publikan kaj solenan karakteron kaj la konstante kreskantan nombron da partoprenantoj, ni vidos, ke ni rapide progresas, ke nia movado estas fortika, ke nenia reformema epidemio minacas nian « fundamentan » organismon, kiu kuraĝe kaj venke, rekte alkondukos nin al fina kaj plena triumfo.

⁂

Kun plezuro ni donas lokon al du jenaj cirkuleroj :

I. *Alvoko al la progesemuloj*. Ni konigas al vi la fondon de Asocio, kies nomo estas « Esperantista Laboristaro » kaj kies celo estas propagandi Esperanton en la laboristaj medioj (socialistaj grupoj, sindikatoj, kooperativoj). Nia ambicio estas krei en ĉiu lando sekcion aŭ filion de nia E. L. Estas necesege grupigi ĉiujn fortojn por veki la indeferentulojn kaj triumfigi niajn sociajn ideojn, uzante Esperanton en niaj internaciaj rilatoj. Ĉiuj interesatoj petu la regularon ĉe la. *Esperantista Laboristaro, 23, rue Boyer, Paris.*

II *La 17^a Internacia Kongreso de la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj (28 de Julio — 1^a de Aŭgusto)*

Tiu ĉi grava Kristana Kongreso estas aranĝata en la germana urbo Barmen. Partoprenos reprezentantoj el multaj unuiĝoj, kiuj ekzistas en ĉiuj partoj de la mondo. Nun en Barmen oni faras grandegajn preparojn por bone akcepti la multegon da alvenontaj kongresontoj. Kelkaj Esperantistoj starigos informejon por samideanoj, kiu troviĝos sub jena adreso : *Esp.-ista Informejo, Lichtenplatzerstrasse, 8, Barmen (Germanujo)*. Esp. kaj propaganda kunvenoj okazos je *vendredo, la 30^an de Julio postagmeze je la 3^a kaj 8^a vespere en la citita Informejo*. Detalaj informoj troviĝos en la Esp. ĵurnalo de la « Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj «. Oni adresu : *Dia Regno, Friedrich-Wilhelmstrasse, 66, Mülheim a. Rhein (Germanujo)*. Ĉiuj Kristanaj Esperantistoj estas kore invitataj partopreni je la Esp. kunvenoj, per kiuj oni celas interesigi la estrarojn de la K. U. J. V. je la Esperanta lingvo.

D-ro J. Ostrovski.

foje, ĉiujn korespondajojn, kiujn ili ricevos el Esperantianoj;

3ᵉ Iliaj nomoj kaj adresoj estu komunikataj al ni per la Konsulo por Junuloj aŭ Konsulino de ilia loko, aŭ, se ne estas, per la Del. aŭ Subdel.

Ĉiuj petoj, kiuj ne konformiĝas al tiuj kondiĉoj, ne estos enpresataj. La Konsulo por Junuloj ricevos tiom da ekzempleroj kiom estas da petintoj en lia loko. Li estas petata ĉiufoje afiŝi tiun rubrikon ĉe la Esp-Oficejo de sia loko kaj traduki nacilingven la petojn, kiuj povas interesi la neesp. publikon.

A. — **Deziras korespondi :**

S-ro Theodor Oster, Burgstr., 46; Wilhelm Schmitz, Burgstr., 26; M. Zülich; Carl Hermann Bachstr., BAD-GODESBERG (Germanujo).

S-ro Barbat, Renault. Durand, Gros, Lurton, Godard, Staub, Moinet, Mouzand, liceanoj, SENS (Francujo).

S-ro Devoney, 3, quai de l'Apport, PARIS.

S-ro Nagel, rue Bessin, CORBEIL (Francujo).

S-ro E. Gaillier, komercofisto, 60, rue Madeleine; Lobbé, rue Ziem; Dambrun, kuktaristo; S-ro Michéa, place Monge; Foudan, ĉe S-ro Coquillard, rue Poterne; F-ino Cotosset, rue de la Comédie, 4; F-ino C. Lévêque, rue Pasumot; S-ino Rollet, rue de la Comédie, 4, BEAUNE (Côte-d'Or) (Francujo).

S-ro Debray, 13, rue Fhai; F-ino Bamas Estelle, 17, rue de Quatre-Roues; F-ino Laballeur, 24, rue la Rivieu; S-ro Labatteu, 15, route d'Alençon; F-ino Chaissier, 20, rue de la Mariette; S-ro Autin, 3, rue de la Mariette; S-ro Plot, 81, rue Hoche, LE MANS (Francujo).

S-ro Pierre Pitavy, André Pitavy, rue de Strasbourg; Robert Troncy, boulevard du Guide, 13; Marcel Nidiaut, 14, rue des Puddleurs; Raymond Orsel, route d'Epinac; Noël Guillot, rue Marceau; Etienne Gracy, 9, rue de Lyon (kun junaj Germanoj, la lasta kun juna anglo), LE CREUSOT (Francujo).

F-ino G. Perez, instruistino; F-ino Fernandez, TERUEL (Hispanujo).

S-ro Akop Akopov, Mihajlovski prosp., 32; Garegin Petrosjan, Vanksi pereulok, 7; Vahtang Saakjan, Nikolaj-placo, 3; Johano Barsekov, Akimovskaja, 1; Ludoviko Skrzinski, Sergievskaja, 2; Vladimir Gogitidze, Chnetskaja, 34; Tiros Tirosjan Turgenevskaja, 2. — P. L-TIFLIS (Kaŭkazo, Rusujo).

B. — **Deziras oficon :**

1. S-ro Ph. Peeters, *Moresnet* (Amikejo), estas lignajisto kaj deziras ricevi oficon en *Bruxelles*.

2. S-ro de Lerber, filologia studento, *Neuchatel*, deziras oficon de guvernisto prefere en Anglujo aŭ Skotlando. En Britujo li akceptas oficon « au pair » en aliaj landoj li postulas pagon. S-ro de Lerber instruas malnovajn lingvojn, la francan kaj germanan kaj iomete parolas la anglan.

3. F-ino Hewig Ninberg (16 jara) en *Bengtsfors* (Svedujo) serĉas oficon por lernado kaj praktika perfektiĝado en *franca* lingvo.

4. Kelkaj polaj studentoj el Krakow serĉas oficon en Francujo dum libertempo, vidu la alvokon en ĉi tiu numero.

5. S-ro D. Kanajev, Kazennyi, Vinnyi, Sklad, *Ekaterinodar* (Rus.) serĉas oficon de librotenisto en urbo de Francujo aŭ Svisujo kun bona salajro.

C. — **Familioj, kiuj akceptas gejunulojn :**

Agencourt (Côte-d'Or, Francujo). Tre rekomendinda kaj bonhava familio, kiu povas dediĉi sian tutan tempon por fremda infano kaj loĝas en ĉarma vilaĝego (2 kilometroj norde de Nuits), dum la libertempo (Aŭgusto aŭ Septembro) deziras interŝanĝi sian 14 jaran filon kun honorinda *germana* familio prefere en urbego. Detalajn informojn donas S-ro Joseph Moron en Agencourt (Côte-d'Or).

Bad Godesberg (Rejnlando, German.). — Geesperantistoj estas bone akceptataj ĉe F-ino Warncke (monate 50 Sm) kaj en la familia pensiono Oranien. (Monate iom pli ol 50 Sm).

Burnley (Anglujo). — S-ro Walter B. Currie (Verda Stelo) tre deziras akcepti francan aŭ belgan junulon aŭ junulinon dum Aŭgusto. Prezo : 3,25 Sm semajne.

Bunooks haw Nr Burnley S. W. (Anglujo). — F-ino Farnworth, instruistino, akceptas en sia familio 1 aŭ 2 junulinojn aŭ fraŭlinojn. Ŝi loĝas en la kamparo 3 mejlojn de Burnley. Prezo : por junulino 3,25 Sm, semajne, por plenaĝa fraŭlino : 5 Sm, semajne.

Lausanne. — Geesperantistoj trovos bonan hejmon ĉe S-ro Andréassian, licenciato de literaturo, Villa les Mouettes, chem. de Villard.

Limoges. — S-ro L. Lamant donas pensionon al esperantianoj por 24 Sm *monate*.

Teruel (Hispanujo). — 2 familioj akceptas geesperantistojn. Prezo por loĝado kaj ĉiuj manĝaĵoj po persono kaj tago 1,60 Sm. Sin turni al la Delegito S-ron Julio Belenguer, San Esteban, 5.

Putney S. W. (Anglujo). — S-ro E. L. Kearney, M. A. instruisto — 33 Oakhill Road. Tiu ĉi pensiono estas tre varme rekomendata per la U. E. A. delegito. Prezo : minimuma 15 Sm, semajne. Se oni deziras krom tio ordinara kunbabilado specialajn lecionojn en la angla lingvo, oni devas pagi iom pli.

Villemomble (Seine-Francujo). — S-ro Raymond Dulaurens akceptas ĉajn personojn. En lia familio oni parolas france, angle, germane kaj esperante.

Praha (Bohem). — S-ro A. Farnick, prof. de modernaj lingvoj, Stefansgasse, komercalernejo Eckert, serĉas *en franca* severa familio pensionon por unu el siaj lernantoj. La pensiono ne devas esti multekosta.

Por Fako Junuloj : F. ROCKMANN.

(*Daŭrigota*).

ANONCETOJ

TARIFO

KORESPONDADO. — *Unu enskribiĝo Sm 0.30 (fr. 0.75). Rabato da 25 0/0 por 6 enpresoj, kaj (50 0/0 por 12 enpresoj. — PI = poŝkartoj ilustritaj; L = leteroj; PM = poŝtmarkoj. Niaj abonantoj rajtas unu senpagan enpreson.*

Petoj & proponoj; Komercaj reklamoj. — *Unu linio (40 literoj : Sm 0.10 (fr. 0.25). Rabato da 25 0/0 por 6 enpresoj kaj 50 0/0 por 12 enpresoj. Niaj abonantoj rajtas unu trilinian anoncetojn.*

NOTO. — Ĉia anonceto estos sendata antaŭ la 5ᵃ kaj 20ᵃ de ĉiu monato, al nia Administrejo, al la lokaj Agentoj aŭ Esperanto-Oficejoj. Pago per poŝtmandato aŭ internaciaj poŝtkuponoj.

Korespondado

HUNGERBURG (Rusujo, Gub. Estland). — S-ro A. D. Eggert-Egede, P. L., P. M.

BUKUREŜTO (Rumanujo). — F-ino Jacobescu Leopoldina, str. Golescu, 10, P. I.

ST-PETERBURG (Rusujo). — S-ro G. Wirenius, W. O. Bolŝuj Prospekt, 27, P. I. (kun Svisoj).

BRADFORD (Anglujo). — S-ro Rowntree, 80, Aberdeen place, lidget greek, P. I., S-ro J. H. Horsley, 1, Woodhall Rd, Thornbury. Ŝakludas per P. I.

BRUŜPERK (Moravio-Aŭstrio). — Juriček Frant, stud. t. c., P. I.

PRAHA-ZIZKOV (Bohemujo-Aŭstrujo). — S-ro F. Jankovsky, stud. rue de Kapliz, 421; S-ro Bret. Korbelar, Riegr., str. 12, P. I.

M. OSTRAŬ (Moravio, Aŭstrio). — S-ro Eugen Esterak, L. (kun Ĝenevanoj pri desegnado laŭ naturo.

MILWAUKEE (Wis-Usano). — S-ro E. Gould, 851, Astor, str., P. I.

DENBEN-DRESDEN (Germ. Saksujo). — S-ro Fritz Radner Paisentalstr., P. I.

Petoj kaj Proponoj

Bonvenantoj en Munheno !

La Munhena Esperantista grupo konatigas, ke ĝiaj regulaj vesperkunvenoj okazas ĉiusemajne ĉiun lundon en la hela restauracio « Altes Hackerbraŭhaus », Sendlingerstrato N 75, kuŝanta en la centro de la ĉefurbo. Vizitoj de Esperantistoj ĉiam estas *treege* dezirataj.

Studento. — Esp. organo de studentoj aperanta en septembro 1909 serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj. — Jarabono 1 Sm. (pagita antaŭ 1 sept. nur 0.75 Sm). Adreso : Praha II, 516, K. Kuthan.

Junulo, konanta funde francan, germanan kaj esperantan lingvojn, bone anglan lingvon kaj skribmaŝinon, deziras oficon, se eble, en librejo aŭ simila laboron en Francujo aŭ eksterlando. Sin turni al P. Boulogne, 94 rue Nollet, Parizo.

Germana studento deziras esti ricevata dum somerlibertempo (aŭg-okt) en franca, svisa, angla aŭ germana familio pro ĉia instruado de lernantoj. Salajro ne nepre postulata. Oni bonvolu skribi al Wilhel Andrae, Teĥnika Universitato, Dresdeno.

Junuloj. — Somerrestado en Bretonujo (Franc.). Junulaj interŝanĝoj kun Angloj. Sin turni al S-ro J. Mariette, Subdel de U. E. A., Clegner par Pont Scorff Morbihan (Franc.), kiu plezure donas ĉiujn necesajn informojn.

Oni acetas diversajn neanglajn produktajojn por revendi; ankaŭ riprezentado de alilandaj firmoj, kiuj dez. ion vendi per aŭkcia vendo aŭ alimaniere en Granda Britujo. Bonegaj referencoj. Sin turni al Esp. Konsulejo, 21, W. Schurbberg, Bristol Anglujo.

Stereoskopaj Vidajoj. — S-ro Karolo Mezei, Teréz. — Korut 4, Budapest Hungarujo, sendas al ĉiu 2 belajn koloritajn vidajkartojn, kiu sendos al li unu stereoskopan vidajon (en koverto).

Postmarkoj. — Sendante al S-ro A. Rodriguez, Valantin 9-30 Bilbao, Hispanujo la sekvantajn Jubileajn aŭstrajn Poŝtmarkojn (40 heller, 50, 60 heller, 1 kaj 2 kron), oni recevos hispanajn — 8 — Izabelo IIᵃ, Amadeo Iᵃ Govierno (jaroj 1850-1873) Alfonso XII (4) Alfonso XIII (8), por la sama P. M. de S-kr. sendos 10 unuaj. Oni povas sendi kiel presajon.

Malnovaj Gazetoj. — H.-T. Bailey, 31, Caversham Rd Kentish Town London, Anglujo, deziras aĉeti nebinditajn jarkolektojn de Lingvo Internacia (1897, 1899, 1905); ankaŭ « Esperantisto » (1889-1895); « The Esperantist » Noj 1, 2, 4, 5, 6, 13; ankaŭ eĉ po unu ekzemplero de « Esperantiste Canadien »; La Espero (Bulg.); Mondlingvisto; Lulea Gaz, Tampere Gaz; Stockolm Gaz; Norda Stelo (Rus.); La tria Cambridge; Esperanto por Studentoj; Esp. Skribajoj; Kalejdoskopo de Esp.; Nova Trumpetisto; Kuriero Internaciona; Esp. Propagando (Majo 1906). L'Esperanto (Ital. Dec. 196).

Novaj Gazetoj. — Ĉiu eldonanto de nova Esp-to jurnalo (eĉ de kluba jurnaleto) estas urĝe petata sendi ekzempleron aŭ almenaŭ sciigon. Se iu bonkora Esper-isto havas malnovajn Esp.) urnalojn, kiujn li ne plu bezonas, mi tre danke ricevus ilin donaĉe. S-ro H. Bailey, 31, Caversham Rb, Kentish Town London, Anglujo.

Komercaj reklamoj

Gastejoj, pensionoj, kaj loĝejoj sin trovas en la saneca urbeto Halstead, Essex, England, ĉirkaŭ kvindek mejlojn de Londono. Petu sciigojn de la sekretariino de la grupo, F-ino In, man Halstead.

Sola en Ruslando kolorigisto de l'fadenaro kaj de l'tolo per speciale nordrusaj vegetajoj daŭraj, nedifektiĝemaj en akvo kuiritaj tinkturoj. En presado kaj kolorigado de l'tolo. Vendado de manfarita rusa tolo. Fabrikado de l'esperantaj kaj de l' ĉiunaciaj flagoj. P. BAĈAROV, propra domo, Strato Rusina, Kostroma, Ruslando.

La firmo ekzistas de l'jaro 1830ᵃ kaj estas honorata de :

L'imperiestro Alexandro IIIᵃ 1886	Arĝentaj. Medaloj.
La Metia Societo en Rybinsn 1887	
La Franca-Rusa Ekspozicio de Ruĝakruco en Peterburgo 1899	
La Niĵnenovgoroda Ekspozicio Intrusry'a. 1896	Insigno de Rusa Imperio
La Jaroslavla Ekspozicio el la Nordrusa Regiono 1903	Oraj. Medaloj.
La Brusela Ekspozicio 1905	
La Antverpena Ekspozicio . . 1906	
La ekspozicio en Rostov ĉe Dono	Grandaj argentaj medaloj
La Moskva Nara ekspozicio. 1908	

TRA LA FILATELIO

Internacia monata organo de ĉiuj kolektistoj de poŝtomarkoj & poŝtkartoj. Jare : En Francujo 2 fr. 10, 80 Sm. En ceteraj landoj 2 fr. 50, 2 Sm. ĉe S-ro Fize, au Pastissou, Béziers (Francujo).

Koviloj sekigantaj « Perfekta » je varma aero kaj aŭtomata reguligilo; maksimuma produktado, lastaj perfektigoj; Katalogo ricevebla de J. Pascarel. Tours (Francujo).

Antaŭ ol akiri domojn, dometojn, kampardomojn kaj ĉiuspecajn bienojn en Italujo, skribu al samideano *Luigi Scarselli*, via dell' Agnolo 48, Firenze (Italia) Li akceptas ankaŭ *riprezentadon* de ĉiaj komercajoj.

Lernejo por Franca & Esperanta lingvo. — En Morges (Franclingva Svis.) apud la mondfama Geneva Lago; belega vidaĵo; trankvila restadejo. Esperanto-Oficejo & societo en la urbo. Favoraj kondiĉoj. Speciale rekomendata, hejma vivado. Por ĉiuj informoj, oni sin turnu al la adreso : Esperanto-domo, Morges, aŭ al Esp Ofic de U. E. A., S ro Jayet (Morges).

Esperanto-Hotelo. — Ĉambroj tre komfortaj. malaltaj prezoj. S-ro A. Leclerc, 40. R. La Rochefoucauld, Paris (Apud stacidomo St-Lazare).

Riprezentado. — Londona Agento, hav. oficejon, dez. riprez. alilandan firmon (ne alkohol.). Bonaj referencoj. — « The Ronda Agency », 87, Finsbury Pavement, London E. C.

Belaj kravatoj verdstelumitaj, la atlaso por sinjoroj, kvin malsimilaj modeloj, de 0 50 ĝis 0.80 Sm.

Esperantaj rubandoj, No 70, el blanka atlaso kun verdaj steloj, por ŝkarpoj, kravatoj, kaj kapeloj de sam inoj; la metro : 0.72 Sm.

Esperantaj flagetoj, bonegaj propagandiloj, dekdu : **1,2** Sm — petu la ĝeneralan katalogon.

Ĉe S-ro B. PEYRAUD, Vic.-Del. U. E. A. *41, rue de la Loire*
Saint-Etienne (Francujo)



Kaptinda Okazpropono !
Kemercemuloj atentu !

Pro konstanta malsaneco kaj gravaj ekster aj klopodadoj, *bonega kaj fruktodona restoracio esprantista* estas nun prenebla, bonega loksituacio, regula klientaro. *Interaranĝoj tre akcepteblaj.* Skribu pri oferproponoj al la jena adreso : *S-ro Atanazo-Restoracio esperantista, 80, rue Mazarine, Paris (VIe).*

TUJ PROFITU TIUN NEREVENONTAN OKAZON

Por la higieno de l'tualeto

(lavajoj, higieno de l' buŝo, la haŭto, lavado de suĉintanaj, intima higieno)

Oni nepre rekomandas
COALTAR SAPONINE LE BEUF
BAYONNE (Francujo)

Kiun ĝiaj antisepcaj, deterŝivaj kaj cikatrigaj propraĵoj akceptigis ĉe la Parizaj Hospitaloj.

En la apotekejoj — Atentu la imitajojn

DIABETULOJ Nenia Malsukceso. Nenia dieto. Vzu la kuracilon kontraŭdiabetan « Autin ». Senduba Resanigo. Vin turnu al S-ro Autin, Farmaciisto, Le Mans (Francujo). Sendu al li 5 Frankojn = 2 Sm. poŝtmandate kaj vi ilin ricevos afranke en Francelando. Por alilando, limpostojn plie.

Universala Esperanto-Asocio

aŭ ESPERANTIO

Fondita la 28an de Aprilo 1908

CELO : Plifaciligi la rilatojn inter diverslingvanoj kaj krei fortikan ligilon de solidareco inter siaj membroj. Por tio ĝi starigas diversajn internaciajn praktikajn servojn tuj uzeblajn de la personoj, kiuj partoprenas en la vivo internacia (Komerco & industrio, turismo, junuloj, informoj, k. a.)

ORGANIZO : En ĉiu regiono estas *Delegito* aŭ *Subdelegito*, kiuj reprezentas la komitaton, varbas membrojn kaj zorgas pri la funkciado de la servoj de la Asocio. Li laŭbezone estas helpata de diversfakaj *Konsuloj* (turismo, komerco, virinoj, junuloj, maristoj), kiuj havas la devon respondi pri sia fako ĉiujn informpetojn de Esperantianojn aŭ Esperantiaj entreprenoj. La *Komitato* estas balotata de la Delegitoj; la Delegitoj estas balotataj de la membroj.

SERVOJ : Senpaga liverado de informoj pri ĉiuj fakoj. — Helpado al vojaĝantinoj. Helpado al junuloj, kiuj vojaĝas eksterlanden aŭ serĉas oficon aŭ deziras ellerni fremdajn lingvojn aŭ viziti alilandan universitaton, k. c. — Starigo de Esperanto-Oficejoj en ĉiu loko. — Reklamo kaj disdonado de reklamiloj. — Perado por reklamo kaj dungado. — Liverado de informoj komercaj kaj enketoj. — Juraj informoj. — Organizo de karavano kaj someraj libertempaj kolonioj. — Eldonado de gvidfolioj. — Instigo al eldonado de gvidlibroj. — Ekspozicioj. — Konkursoj, k. t. p., k. t. p.

ALIĜOJ : Ĉiu persono, kiu deziras aliĝi, informu pri tio la Delegiton aŭ Subdelegiton de sia loko (se nestas nek Del., nek Subdel., li sin turnu al la sidejo de U. E. A.) kunsendante la jarankotizajon **36 sd.** Interŝanĝe li ricevos membrokarton, kiu donos al li la rajton uzi ĉiujn servojn de U. E. A. — La grupoj, societoj, komercaj firmoj, gazetoj, kontoroj, korporacioj, k. a., povas aliĝi kiel *Esperantiaj entreprenoj* (Kotizajon : **2 sm.**) kaj interŝanĝe rajtas uzi la specialajn servojn de U. E. A. starigitajn por ili. La grupoj, societoj, organizajoj, k. a., kies ĉiuj membroj estas samtempe membroj de U. E. A., estas *Esperantiaj Asocioj* kaj senpage ĝuas la rajtojn de la Esperantiaj Entreprenoj.

NUNA STATO : Je la 1ª de Julio, U. E. A. kalkulis 70 Delegitojn, 110 Vicdelegitojn, 560 Subdelegitojn, 465 Konsulojn, 135 Esperanto-Oficejojn, en 650 lokoj kaj 44 landoj; ĝi havis 4000 membrojn, 61 Esperantiajn Entreprenojn kaj 9 Esperantiajn Asociojn.

KOMITATO DE U. E. A.

Dro L. L. ZAMENHOF, Honora Prezidanto.
H. BOLINGBROKE MUDIE, Prezidanto, London.
H. HODLER, Vicprezidanto (*Administrado*, Genève).
TH. ROUSSEAU, (*Financoj*), Dijon.
A. CARLES, (*Konsuloj*), Béziers.
P. BLAISE (*Esperanto-Oficejoj*), London.
J. SCHMID (*Turismo*), Bern.
Dro M. KANDT (*Komerco & Industrio*), Bromberg.
F. ROCKMANN (*Junuloj*), Magdeburg.

Sidejo : **8 rue Bovy Lysberg, Genève** (Svisujo).

Oficialaj eldonajoj de U.E.A.

Oficiala Jarlibro (Plenaj informoj pri U. E. A., ĝia organizo, ĝiaj servoj kaj la maniero ilin uzi, k. c. Plena listo de la Delegitoj, Vicdelegitoj, Subdelegitoj, Esp.-Oficejoj de U.E.A.). Necesega por ĉiuj membroj. Prezo : 0,25 Sm.; 10 ekz. 2 Sm.

Oficiala insigno (verda stelo kum blanka rando, rezervita por Esperantianoj). Prezo : 0, 36 Sm.

Oficiala leterpapero (por Delegitoj, Subdelegitoj kaj membroj). 100 folioj : 0. 70 Sm.

Oficialaj kovertoj. Prezo, 100 ekz. : 0,40 Sm.

Oficialaj poŝtkartoj. Prezo, 100 ekz. : 0,70 Sm.

Gvidfolioj de U. E. A. (Rekomendataj al ĉiuj vojaĝantaj Esperantianoj). Senpage riceveblaj kontraŭ marko aŭ kupono de 0,10 Sm. Oni povas mendi la gvidfoliojn aparte.

Universala Esperanto-Asocio, ĝia celo, ĝia organizo, ĝiaj praktikaj servoj, ĝia signito. Propaganda broŝureto. Prero, 10 ekz.: 0, 20 Sm.; 50 ekz.: 1,50 Sm.

Oficiala Bulteno. (senpaga par Delegitoj, Subdelegitoj kaj Konsuloj).

PROPAGANDAJ BROŜUROJ EN NACIAJ LINGVOJ :

Universala Esperanto-Asocio. Enkonduko, celo, organizo, praktikaj servoj, socia signifo, konsiloj al la interesatoj, k. t. p. Tiu bonega propaganda broŝuro, kiu klare konigas U. E. A. al la neesperantista publiko, estas nepre rekomendata al ĉiuj niaj propagandistoj.

Ekzistas ĝis nun eldonoj en lingvoj *franca, germana, hispana* kaj *itala*. Eldonoj angla, rusa kaj portugala estas en preparo.

Prezo, 10 ekz : 0·20 Sm ; 50 ekz : 0,80 Sm ; 100 ekz : 1,50 Sm.

AVIZOJ : Ĉiuj mendoj estu sendataj jel **Esperantio**, 8, rue Bovy-Lysberg, *Genève* (Svisujo). Tamen, nacilingvaj propagandaj broŝuroj estas an kaŭ riceveblaj el la jenaj adresoj :

Dro M. KANDT, 8, Neuer Markt, *Bromberg* (Germana).
P. LINARES, Santo-BASILIO, *Cordoba* (Hispana).
A. TELLINI, 12, Casella Postale, *Bologna* (Itala).

Kalkulo estas malfermata nur al Delegitoj et Subdelegitoj. Ĉiuj aliaj personoj devas aŭ mendi per sia loka Delegito, aŭ kunsendi la monon samtempe kun la mendo. Personoj, kiuj deziras rekomendigi sian mendajon, aldonu 0,10 Sm.



日本エスペラント

INTERNACIA ILUSTRATA MONATA REVUO

Generalajn kaj literaturajn informojn de la Ekstrema Oriento

Jara abono : **2 Sm.** = **5.10** fr.

« Japana Esperantisto » Marunouchi, Tokio, Japanujo.
« Librejo de Esperanto » 15, rue de Montmartre, Paris.

Per via nacia lingvo, la celajn ideojn ...

CARACTÈRES D'IMPRIMERIE MAYEUR — PARIS

ALLAINGUILLAUME, J. SALING & Cie

GRAVEURS-FONDEURS — SUCCESSEURS

CARACTÈRES & VIGNETTES EN TOUS GENRES

21, RUE DU MONTPARNASSE

SPÉCIALITÉ LETTRES ET CARACTÈRES ACCENTUÉS

FOURNISSEURS DE TOUS LES CARACTÈRES ESPERANTO & SIGNES ACCENTUÉS EMPLOYÉS A L'IMPRIMERIE DE "L'U.E.A." POUR LA COMPOSITION DU JOURNAL "ESPERANTO" & DE TOUS LES IMPRIMÉS FAITS EN CETTE LANGUE

ROMAIN	TYPES DIDOT	ITALIQUE
ĉĝĥĵŝŭ	Corps 7 — Bas de casse	ĉĝĥĵŝŭ
ĈĜĤĴŜŬ	Capitales	ĈĜĤĴŜŬ
ĉĝĥĵŝŭ	Corps 8 — Bas de casse	ĉĝĥĵŝŭ
ĈĜĤĴŜŬ	Capitales	ĈĜĤĴŜŬ
ĉĝĥĵŝŭ	Corps 9 — Bas de casse	ĉĝĥĵŝŭ
ĈĜĤĴŜŬ	Capitales	ĈĜĤĴŜŬ
ĉĝĥĵŝŭ	Corps 10 — Bas de casse	ĉĝĥĵŝŭ
ĈĜĤĴŜŬ	Capitales	ĈĜĤĴŜŬ

ÉGYPTIENNE CORPS 8 N° 406

ĉĝĥĵŝŭ ◆ ĈĜĤĴŜŬ

GALA PETER

D. PETER, inventeur

VEVEY-Suisse

LE PREMIER CHOCOLAT AU LAIT

TOUTE AUTRE MARQUE EST UNE IMITATION

KVINA KONGRESO DE ESPERANTO

Barcelono, 5-11 Septembro 1909

ALIĜILO

Mi petas la direktoron de ESPERANTO, ke li mendu de la organiza komitato de la Kvina Internacia Esperantista Kongreso :

	Sm.	
...... Karto(j)n de Kongresano(j) :		
4 Sm. por ĉiu karto)		
...... biletojn por **septaga** loĝado kaj manĝado, nome		
...... biletojn de **klaso A** (po **14** Sm.)		
...... biletojn de **klaso B** (po **21** Sm.)		
...... biletojn de **klaso C** (po **35** Sm.)		
II		
...... dekojn da poŝtkartoj n-ro 1 (Katalunulino) (po 22 Sd).		
...... dekojn da poŝtkartoj n-ro 2 (floraj Ludoj) (po 42 Sd.		
...... centojn da kongresaj markoj (po 20 Sd)		
...... broŝurojn « La Rondo », danco Esp. (po 12 Sd)		
...... standardojn Esperantajn (po 40 Sd)		
...... standardojn ...... (po 80 Sd)		
...... ekzemplerojn de la traduko « *Mistero de Doloro* » (80 Sd)		

Mi deziras, ke ĉio supre mendita estu sendita per *rekomendita* poŝto kaj tial mi aldonas 10 Sd.

Entute mi ĉi-kune sendas per poŝtmandato aŭ ĉekola *sumon* da ...... kaj mi petas, ke oni sendu ĉion supre menditan al la jena adreso :

Nomo :

Lando, urbo :


Strato :

Subskribo,

Legeble pleniĝu tiun mendilon, detranĉu ĝin kaj sendu ĝin kun responda mono al ESPERANTO, 8, rue Bovy-Lysberg, *Genève* (Svis.).

Grava Avizo : La poŝto ne akceptas poŝtmandatojn por Hispanujo.

AUTOMOBILOJ "BRASIER"



CUZON

agento de Esperanto-Oficejo

52, Rue de Paris, 52

CHARENTON

Seine (France)

Telfono 77

TELEGRAFA ADRESO : *Cuzon, Charenton-le-Pont, France*

Standardoj Esperantaj

kaj diversnaciaj

Artikoloj por ornamo kaj iluminado

Ŝildoj, Girlandoj, Lampionoj stelformaj
Signetoj, Poŝtuketoj
Kravatpinkloj kun elektra stelo
Brakbantoj kun stelo aŭ surskribajo
Ferladenaj steloj kun verdaj glasetoj por iluminado
Najloj kun kapo orita stelforma
Stampiloj kaŭĉukaj

Fabrikado de artikoloj laŭ modelo

PETU LA ILUSTRITAN PREZARON

ESPERANTO-LIBREJO

G. WARNIER ET Cie

PARIS — *15, rue Montmartre, 15* — PARIS

VENDAS ĉiujn Esperantistajn Librojn, Muzikajojn, Broŝurojn, Insignojn, novajn aŭ malnovajn ;

ABONIGAS al ĉiuj Esperantistaj aŭ ne esperantistaj gazetoj ;

HAVIGAS al siaj klientoj ĉiujn librojn eldonitajn en ĉiuj landoj.

Oficiala tenejo de la Esperanto-Oficejoj de U E. A.

LIVERANTOJ DE MUSTARDO KAJ AMELO AL LA REGO

Laŭ privilegio

J. et J. COLMAN

(Akcia Societo)

MANUFAKTURISTOJ DE

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON

kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando)

ESPERANTISTA

SURMURA KALENDARO

por 1910a.

Devizo : *Neniu tago sen Esperanto*

GESAMIDEANOJ,

Subskribinto havas la plezuron informi vin, ke li preparas la eldonon de « *Esperantista Surmura Kalendaro* » por 1910. Ĉiutaga kalendaro estas novajo en la historio de Esperantismo ; pro tio mi ne volas eldoni ĝin, antaŭ ol mi scias viajn diversajn konsilojn, dezirojn kaj proponojn, rilate al tiu ĉi kalendaro, por ke ĝi iĝu laŭ la gusto de l' granda plimulto el vi.

Ŝildo havos amplekson da 25×32 centimetroj ; ĝi estos bele kolorpresata, reprezantante Esperantan simbolon, laŭ desegnajo de sperta desegnisto.

Bloketo havos amplekson da 8 × 12 centimetroj : oni povos forpreni ĉiun folieton, sen difektado.

La antaŭa flanko de l' folietoj surhavos la nomon kaj ciferon de l' tago, la nomon de l' monato, kaj kelkajn liniojn por rememordatoj, devizoj, proverboj, k. c.

La postflanko de l' folietoj surhavos bonan prozon aŭ poezion.

Ne necese diri, ke la enhavo estos tute neŭtrala, tiel ke ĉia Esperantisto povos aprobi kaj ŝati ĝin.

La prezo de l' tuta kalendaro - afrankite ĉien - estos *nur 60 Sd* aŭ *6 internaciaj responkuponoj*, kun speciala rabato por klubo j k. c. Cetere el la *unua 100°* da mendintoj (ekster Nederlando), ĉiu ricevos *artan objekton* el mia patrolando.

Mi alvokas ĉiun, kiu havus ion por konsili, deziri aŭ proponi por la bona aranĝo de l' kalendaro, kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al mi.

Ĉar la kalendaro estos presata kaj ekspedata en la komenco de Novembro, mi avertas, ke por mendoj venintaj post Oktobro, mi ne povos garantii la liveradon.

Kun samideanaj salutoj,

J. L. BRUIJN, 170, Kepplerstraat

HAGO, (Nederlando).

Marŝeto de l'Esperantistoj

facila, marŝiga (kanto kun f. piano) : 1 ekz., 0 fr. 50, afrankite 0 fr. 55 ; 10 ekz., poŝtmandate, 3 fr. 50 ; 20, 6 fr. Al kiuj mendos nur 1 ĝis 9 ekz. de tiu-ĉi marŝeto antaŭ la 21an de Junio por Francujo, antaŭ la 21an de Julio por aliaj eŭropaj landoj, l'aŭtorino sendos Troyes' an P. I. (ĝenerala vidajo de l'urbo, skulptajo aŭ katedra preĝejo, laŭ prefero, — aŭ tiujn-ĉi tri kune sub koverto.

Sin turni al F-ino B. HENRY, 44, str. Jaillant-Deschanets, Troyes, Aube (Francujo).

CESKY ESPERANTISTA

(Bohema Esperantisto)

TRE ZORGE REDAKTATA PROPAGANDA REVUO

ENHAVO : *Esperantaj artikoloj*, pri nuntempaj temoj, ĉefe internaciaj.

Raportoj kaj notoj, pri la progreso de civilizado.

Kroniko pri Esperanto Movado.

Redakcio : Praha III 495. Austrio.

Administrejo : Jevicho (Moravio, Austrio).

Jara abono : 1.70 Sm.

Senpaga por anoj de Bohema Asocio Esp.

Sekretario : D-ro KAMARYT. Praha VI.

Verda Stelo

Ĉiu Esperantisto devas porti la verdan stelon

La firmo **Benoit MAISONPIERRE**

EN DEN HAAG, HOLAND

vendas novan insignon por butontruo, kravatpingla kaj broĉa

Prezo : 0, 20 Sm., Fr. 0,50, flor., 0,25

Rabato al revendistoj kaj Grupoj

Esperantistoj Atentu !

Se vi volas trinki *bonajn* kaj *naturajn* vinojn de Bordeaux je moderaj prezoj, *mendu la tarifon* kiu estas sendata senpage de la firmo,

A. COUSSEAU, Begles-Bordeaux

Rabato 5 % al la *samideanoj* kiuj rekomendas sin de kiu ci gazeto.

Oni akceptas agentojn en ĉiuj urboj kaj landoj. Kondiĉoj tre favoraj.

INTERNACIA TRADUKA OFICEJO

akceptas mendojn je tradukoj el la plej multaj naciaj lingvoj en Esperanton. Speciajoj : Traduko de *Katalogoj*, *Prezaroj* kaj ĉiuspecaj *Reklamoj*. Pago laŭ interkonsento. Turnu vin al : RIGALKE ET MOHWINKEL, internacia Traduka Oficejo, 6, Schleinitzstrasse, Bromberg (Germanujo).

La Universala Ŝlosilo

DE CEFEC



Ŝlosiloj. 10 ekz. Fr. 0,50 — 100 ekz. Fr. 3,58.
Tutoj. 10 ekz. Fr. 1,00 — 100 ekz Fr. 7,00.
Anekdotaroj. 1 ekz. Fr 0,25 10 ekz Fr 2,00.
Ŝlosilaro (ĉiuj aperintaj ŝlosiloj en elegante bindita volumo) 1 ekz. Fr. 1,50

Granda elekto de insignoj

Petu plenan prezaron ĉe

Internacia propagandejo Esperantista

Merton Abbey, London, S. W.

Ĉio estas ankaŭ havebla ĉe Esperanto-Oficejoj kaj G. WARNIER ET Ko, 15, rue Montmartre, Paris.

I. Kongreso de Bohemaj

ESPERANTISTOJ

aranĝata de

CENTRA ASOCIO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

(*B. U. E.*)

OKAZOS EN PRAHA

26, 27, 28 IX 1909

Fremdlandaj samideanoj revenantaj el kongreso Barcelona ne forgesu viziti nian kongreson. Ĉiuj kore invitataj.

Kongresa adreso : PRAHA-I-342. Esperanto-Kafejo-Union.

PROPAGANDILO

Belegaj Kongresaj Fotografajoj

de l'Kvara Esperantista Kongreso

Ĉiu bildo : 0, 50 Sm. afranke.

Postulu la nomaron de la tuta kolekto

Frany Müller, fotografisto, 2, Gartenstrasse

LEIPZIG (Leutzsch)

Grandaj Vinoj el Burgonjo

MOREAU-VOILLOT

BEAUNE (Côte-d'Or-Francujo)

Firmo fondita en 1786, daŭrigita de patro al filo

Honorindaj makleristoj estus akceptataj

Oni petu la prezaron esperantan

MONDINKO

NIGRA POR KOPIO

NIGRA dum la skribo ✠ ✠ ✠ ✠
Liveras NIGRAJN kopiojn ✠ ✠ ✠ ✠
Restas NIGRA post la kopio ✠ ✠ ✠ ✠

Jules MIETTE, PARIS (Francujo)

TOBLER'A

bonega Svisa Lakta Ĉokolado

ESPERO

kun Esperanto-Jurnalo ilustrita

cie acetebla

EN ĈIUJ STATOJ

Oni serĉas kapitalistojn et industriistojn kiuj volus fabriki

SPCIALAN APARATON

por

Konservado de Nutrajoj, fruktoj k. t. p.

ĝin PATENTIGONTAJN en siaj landoj

Negranda kapital bezonata
Grandega Profito
Perantoj akceptata

Oni sin turnu al : **VACLAV CANSKY**

PROSEK GEI PRAHA

Bohemujo, Austrio

Le Gérant : BALANDRA.

Imprimerie CAILS, Dijon.